


**Paiva Netto skribas**

**"LBV, Rio-92 kaj la defioj de Rio+20"**

RIO+20
Conferência das Nações Unidas sobre Desenvolvimento Sustentável

www.bonavolo.com

# BONA VOLO

**EKONOMIA + SOCIA + MEDIA**

Presita sur reciklita papero



Foto: Rusa Spac-Agentejo (Roscosmos)

**ANALIZOJ KAJ PERSPEKTIVOJ**



Izabella Teixeira



José Goldemberg



Paulo Saldiva



Fabio Feldmann



Beatriz Fagundes



Daniel Arroyo



José Alberto Machado



Adalberto Luis Val



Marco Antonio Palermo



Gianfranco Beting

**PLANEDO TERO ATENDAS URĜAN REEDUKADON DE HOMOJ**

## Solidara, Ekumena Socio por iu bela, daŭripova mondo

LBV 63-jara

Konu la signifoplenajn rezultojn de Legio de Bona Volo por forigo de malriĉeco kaj por konservebleco de nacioj, pere de ampleksa edukado de infanoj, adoleskantoj, plenkreskuloj kaj maljunuloj kun malalta mongajno.

**LEGIO DE BONA VOLO**: Brazila organizo kun statuso de ĝenerala konsultanto ĉe la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (EKOSOK), ekde 1999, prezentas rekomendojn al aŭtoritatuloj ĉe Rio+20 kaj ĉe Altnivela Kunsido de Ekosok, en Novjorko, Usono, en 2012.

# Rio+20
## unika okazo



Legio de Bona Volo (LBV) kredas pri la transformopova forto de la homo, kapabla je grandaj faroj, kiam lin prilumas kono kaj inspiras la deziro fari Fratan Bonon. Tiel, eblas venki ĉian ajn malfacilaĵon kaj konstrui pli ekvilibran mondon, konscian kaj zorgeman pri la medio. Tial ni salutas la Organizon de Unuiĝintaj Nacioj kaj la aŭtoritatulojn engaĝitajn en plenumado de konferenco Rio+20, en Brazilo, kaj la Altnivela Kunsido 2012, en Novjorko, Usono. En tiuj gravaj kunsidoj de mondaj gvidantoj kaj fakuloj pri la temo daŭripoveco kaj pri forigo de malriĉeco, ekaperas okazo antaŭenpaŝi cele al jam interkonsentitaj proponoj. Ĝi estas taŭga momento por starigi fundamentojn por konservado de nia monda loĝejo, se oni konsideras estontajn generaciojn.

Ĉi tiu publikigaĵo estas disponebla ankaŭ en la hispana, franca, angla kaj portugala lingvoj, kaj prezentas la sperton de LBV koncerne estigadon de daŭripova elvolviĝo, kaj krome malfermas diskutforumon, alportante la opiniojn de renomaj aŭtoritatuloj kaj esploristoj. Ili ĉiuj, en siaj respektivaj agadkampoj, indikas vojojn por solvado de problemoj kaj proponas manierojn pliriĉigi dialogon en ambaŭ superaj instancoj. Antaŭ ol transdoni la parolon al tiuj amikoj en nia mondo, la leganto sekvu fratan, ekumenan mesaĝon de la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo, nome la ĵurnalisto, radikomunikanto kaj verkisto José de Paiva Netto; poste, nelongan historion pri la partoprenado de LBV en Rio-92 kaj agadon de tiu Institucio sub la standardo de daŭripova sintenado.

**Bonan legadon!**

**Kanaloj de LBV** en interreto

www.bonavolo.com


Facebook: Bona Volo

Twitter: @BonaVolo

Youtube: PortaloBonaVolo


HOMENS DE BOA VONTADE
L
LBV
V

## ENHAVTABELO






**8** MESAĜO DE PAIVA NETTO
*LBV, Rio-92 kaj la defioj de Rio+20*







**16** HISTORIO
*Rio-92 firmigas la koncepton pri daŭripova elvolviĝâdo*

**26** KONU LBV-on
*Por iu pli bona mondo kaj por iu pli feliĉa Homaro*







**86** RETO SOLIDARA SOCIO
*Verda ekonomio kaj malpliigo de malriĉeco*

**94** REKOMENDOJ
*Deklaro de LBV por Rio+20 kaj por Altnivela Kunsido 2012 de Ekosok/UN*

## 58 ANALIZOJ KAJ PERSPEKTIVOJ

***Aŭtoritatuloj, sciencistoj, komunikantoj, edukistoj kaj entreprenistoj kune pripensas daŭripovan konservadon de nia planedo***



58 *Izabella Teixeira*


62 *José Goldemberg*


66 *Fabio Feldmann*


70 *Adalberto Luis Val*


70 *José Alberto da Costa Machado*


74 *Marco Antonio Palermo*


77 *Paulo Saldiva*


80 *Gianfranco Beting*


82 *Beatriz Fagundes*


84 *Daniel Arroyo*


BONA VOLO
EKONOMIA + SOCIA + MEDIA

Nepolitika, senpartia revuo pri Ekumena Spiritualeco

Celebra eldono — 5/6/2012

BONA VOLO estas publikigaĵo de LBV, eldonata de Eldonejo Elevação. Registrita sub n-ro 18166 en la libro "B" de la 9ª Notariejo de Registrado de Juĝ-Dokumentoj de San-Paŭlo (Brazilo).

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco de Assis Periotto — MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALA KUNORDIGADO:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**KUNORDIGADO PRI PROPAGANDO KAJ KOMUNIKADO:** Gizelle Tonin de Almeida

**SKIPO ELEVAÇÃO:** Adriane Schirmer, Aline Portel, Allison Bello, Ana Lúcia Ramalho, Ana Paula de Oliveira, Andrea Leone, Angélica Periotto, Bettina Lopez, Camilla Custódio, Cida Linares, Daniel Guimarães, Danielly Arruda, Diego Ciusz, Felipe Duarte, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, José Roberto Tenório da Silva, Laura Leone, Leila Marco, Letícia Rio, Lísia Peres, Luci Teixeira, Maria Aparecida da Silva, Mariane de Oliveira, Mário Augusto Brandão, Neuza Alves, Paulo Sergio Viana, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Roseli Garcia, Sarah Moreno, Silvana Bosso, Silvia Fernanda Bovino, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri Baptista.

**KOVRILO:** Helen Winkler / **KOVRILA FOTO:** Rusa Spac-Agentejo (Roscosmos)

**GRAFIKA PROJEKTO:** Helen Winkler / **GRAFIKA ARANĜO:** Felipe Tonin, Helen Winkler kaj Kátia Borba

**PRESADO:** Mundial Gráfica

**ADRESO POR KORESPONDADO:** Rua Doraci, 90 — Bom Retiro — CEP 01134-050 — São Paulo/SP — Brasil [Brazilo] — Tel.: (+5511) 3225-4969 — Poŝtkesto 13.833-9 — CEP 01216-970 — Retejo: www.bonavolo.com — Retadreso: esperanto@bonavolo.com


**Revuo BONA VOLO *Ekonomia+Socia+Media* ne respondecas pri konceptoj kaj opinioj en siaj subskribitaj artikoloj.**

# *Dum ankoraŭ estas tempo*

*Ni pledas por harmonio de ĉiuj por bono al ĉiuj, dum ankoraŭ estas tempo, ĉar ni kundividas unu solan loĝejon, nome la Teron, kaj malbonuzado flanke de ĝiaj enloĝantoj pli kaj pli postulas nepran decidon: konstruo aŭ detruo (...), kaj pro tio ni devas strategie labori kune, cele al efektiva prosperado ĉe popolaj amasoj.*

**Paiva Netto**

Elprenita el la revuo *Tutmondigo de la Frata Amo*, paĝo 30, publikigaĵo tradukita al pluraj lingvoj, aparte direktita de Paiva Netto al la partoprenantoj de la Altnivela Kunsido (*High-Level Segment* 2007) de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok), organo de Unuiĝintaj Nacioj, kie LBV havas statuson de ĝenerala konsultanto.

consciência
ampla

## Onde tem Consciência Ampla, tem projetos de educação para o consumo consciente.

O Consciência Ampla é o programa de responsabilidade socioambiental da Ampla. Nele, a educação é nossa principal aliada para conscientizar crianças, jovens e adultos sobre a importância do consumo consciente de energia e o uso racional dos recursos naturais.



**Conheça nossos canais on-line:**

- @conscienciampla e @amplaenergia
- AmplaRJ
- www.conscienciaampla.com.br
- amplaenergia

# Nossos projetos:

O Programa Consciência Ampla possui 11 projetos que beneficiam, anualmente, mais de 400 mil pessoas em toda área de concessão da Ampla. São diversas atividades interativas, como oficinas e palestras voltadas para a prática do consumo consciente da energia. Além disso, abordam temas ligados à cultura, artes, esporte, inclusão digital, reciclagem e outros, sempre com a proposta de impactar a vida das pessoas seja a longo ou curto prazo.

**Conheça os projetos acessando:**
www.conscienciaampla.com.br


QR Code



ampla
uma empresa endesa brasil

# LBV, Rio-92 kaj la defioj de Rio+20

João Preda



José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radiopreleganto, komponisto kaj poeto. Li naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo. Li estas direktoroprezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Estas aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Internacia, Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI–Inter), ano de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de *International Federation of Journalists* (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Beletra Akademio en Centra Brazilo kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).




Antaŭ 20 jaroj, okaze de la Konferenco de Supera Instanco de Unuiĝintaj Nacioj pri Medio kaj Elvolviĝo, nome Rio-92, Legio de Bona Volo (LBV) prezentis sian proponon por starigo de mondo subtenebla, laŭ vidpunkto ekologia kaj etika: eduki, reeduki, instrui kaj spiritualigi, survoje al Paco. Tio pluvivigas kreitojn, naciojn, la Naturon, la planedon.

Oni ne rajtas progresi detruante la mondon, nian kolektivan domon, pro nescio. Ne eblas longa vivo per elvolviĝo, kiu frakasas sian propran vivejon kaj ties loĝantojn. Ĝi estas kontraŭdiro signita per manko →





João Periotto

de informoj, ne nur intelektaj, sed ankaŭ, kaj precipe moralaj kaj spiritaj.

Okaze de tiu epokfara konferenco, inspira sceno trairis la mondon: grupo de kelkaj infanoj flegataj de Legio de Bona Volo en la ĉefurbo de subŝtato Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, ĉirkaŭvolvis per esperplena brakumo la Arbon de Vivo, kiu estis simbolo de Rio-92. Post du jardekoj, multaj el tiuj etuloj, puŝite per Pedagogio de Amo kaj per Pedagogio de Ekumena Civitano* — lasante, ke ĝermu en siaj koroj la semo de tiu memorinda renkontiĝo — transformiĝis en plenkreskulojn kun firma soci-media konscio. Tio estas simpla ekzemplo, meze de tre komplikaj diskutoj tra la mondo. Infanoj bone orientitaj koncerne la medion estos la estontaj regantoj, entreprenistoj, ekonomiistoj, kuracistoj, laboristoj, sciencistoj, fine civitanoj, kiuj antaŭenpuŝos daŭripovan elvolviĝon ĉe plej diversaj kampoj, ĉar super ĉio ili estos etikaj, solidaraj, fratecaj.

Ankoraŭ ĉe Rio-92, Legio de Bona Volo lanĉis Kampanjon *"Ankaŭ homoj estas animaloj. Protektu la brazilan infanon"*. Kiam la franca oceanologiisto kaj esploristo **Jacques Cousteau** (1910-1997), kiun respektoplene akceptis la partoprenantoj en la Supera Gvidantaro en 1992, eksciis pri la iniciato de LBV, tiam li esprimis sian apogon:


Diskonigo

Jacques Cousteau

— *Se ni ne zorgos pri la infanoj, nenio rezultos de nia diskutado pri la ekologia problemo.*


Evangelisto Ferreira


Arkivo BV

Partoprenis en Rio-92 reprezentantoj de 180 landoj kaj pluraj neregistaraj organizoj, interalie Legio de Bona Volo. La loko donita al LBV ĉe la Tutmonda Forumo allogis atenton de la publiko kaj oni ĝin alnomis "Stando de la Kristo", precize pro la emfazo, kiun la Institucio faras pri la frata, ekumena mesaĝo de Jesuo, pro la kredo, ke valoroj kiel Solidareco, Respekto kaj Amo estas decidigaj por la solidigo de pli bona mondo.

Same emfazis la ĝenerala sekretario de Rio-92, **Maurice Strong**:


*— Mi konsentas kun tiu kampanjo de LBV. Mi esperas, ke la plej gravaj decidoj, kiujn oni faros ĉi tie, havos plej grandan apogon, novajn energiojn, kromrezultojn, por fari, ke infanoj en Brazilo kaj en la tuta mondo havu novajn ŝancojn.*


Leila Marco
Maurice Strong

Nian saluton kaj bondezirojn por alta sukceso al la gastantino de la defia Rio+20, nome la prezidentino de Brazilo, **Dilma Rousseff**, same kiel al dignaj ŝtatestroj kaj iliaj akompanantoj, kiuj ĉeestos la renkontiĝon, krom la reprezentantoj de la civila socio.

Ni decidoplene respondu al la alvoko por tiu evento, konsciaj pri la urĝa bezono flankenlasi tion, kio estus bruliga teorio kaj kunigi niajn fortojn, starigi partnerecojn, realĝustigi niajn erarojn. Fine, ni staras sur la Tero. Ĝi estas nia sola loĝejo! Tio postulas, ke ni fariĝu veraj ekumenaj civitanoj, tio estas, tutplanedaj, tutmondaj en Bonfarado. Sen tio, tutmondigo eble transformiĝos en grandan danĝeron.

## Ŝanĝoj en la medio kaj ties korolarioj


Roberto Stuckert Filho/ABr
Dilma Rousseff

Dum pli ol 56 jaroj da laborado en ĉi tiu agadkampo de Bona Volo kaj respekto al ĉi tiu mondo kaj al ĝia plej granda kreito, la homo, nome ni ĉiuj, mi havis la okazon — per intervjuoj, paroladoj, prelegoj, radi- kaj televidprogramoj, libroj, artikoloj, k.t.p. — paroli pri mediproblemoj kaj ties korolarioj.

Ĉe unu el tiuj okazoj, je la 10-a de oktobro 1981, en intervjuo, kiun mi donis al itala ĵurnalisto, kiu enradikiĝis en Brazilo, **Paulo Parisi Rappoccio**, mi

---

***Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano** — Legu pri tio en la paĝo 42 de ĉi tiu revuo.

## En Rio-92, kampanjo de LBV defendas infanaron

*Ankaŭ homoj estas animaloj. Protektu la brazilan infanon.* Ĉi tio estis grava kampanjo lanĉita de Legio de Bona Volo dum Rio-92. Ĝia slogano frate pledis por la inkludado de esence grava temo en la analizadon de demando pri la naturmedio: infano. Fine, prizorgi la homon per tuteca maniero estas fundamenta punkto por daŭripova elvolviĝado. Dum la 12 tagoj, kiuj markis la konferencon, tiu iniciato de la Institucio elstariĝis kaj emfazigis al reprezentantoj de 180 landoj tie ĉeestantaj — inter ŝtatestroj, ministroj kaj aliaj aŭtoritatuloj — certaĵon: ke la mizeran situacion de milionoj da knaboj kaj knabinoj en la tuta mondo oni ne rajtus forgesi en tiu renkontiĝo. Ja por la estonteco de tiuj infanoj kaj de ĉiuj homoj en situacio de socia malavantaĝo LBV eklaboris dum Rio-92. Per sia mesaĝo al la mondaj gvidantoj, Legio de Bona Volo rememorigis ilin, ke precipe fronte al malriĉeco kaj fronte al rezultoj de klimataj ŝanĝoj, estas nepre necese, ke ni estu solidaraj por mildigi ĉian suferon.




La sukceso de la kampanjo de LBV, kiun elvolvis agentejo DPZ, atingis trans la kunteksston de la konferenco. La kreema konceptado de tiu propaganda laboro konkeris aliajn publikojn, kaj alportis du gravajn premiojn: Ora Leono, en Festivalo pri Propagando en Cannes, Francujo, kaj Ora Koko, en Festivalo de Gramado, Brazilo, ambaŭ en 1993.

**_Kaj jen unu plia ekzemplo de bonega politiko. Ĝi estas la decido eduki, reeduki, instrui, spiritecigi survoje al Paco, kiu rezultas el kunfratiĝo de multenombraj kulturoj formantaj la civilizon, kiu mem estas unueca, tutmonda (...)._**

konsideris la neprokrasteblan bezonon lumigi kapitalismon per la torĉo de morala, etika spirito de Karitato, kiu venas el Dio — kiu signifas Amon, Justecon en Vero kaj Kompatemo —, por ke la senlima deziro pri kapitalo, tio estas, korupto kaj avido, ne detruu demokration, ni diru, solidiĝintan en iuj lokoj kaj komenciĝantan en aliaj.




Paulo Parisi

[Tiun "ni diru" mi intence almetis, ĉar iu venas kaj diras:

— *Jen tie ekzistas demokratio...*

Tamen, tiom da krimoj oni tie faras kontraŭ spirito de demokratio, ke oni pensas: "Sed ĉu temas pri tio?!".

Sed kiel diris **Churchill** (1874-1965),



Churchill

— *Demokratio estas la plej malbona regsistemo, escepte de ĉiuj ceteraj formoj, kiujn oni provis de tempo al tempo.*]

Male ni plu horore vidados neon al rajto je libereco, al vivo, al sano, al lernado, al laboro kaj al feliĉo, flanke de amasoj da homoj, kiuj **aŭdacis naskiĝi**.


## Ni estas komplementaj estuloj

Kaj jen unu plia ekzemplo de bonega politiko. Ĝi estas la decido eduki, reeduki, instrui, spiritecigi survoje al Paco, kiu rezultas el kunfratiĝo de multenombraj kulturoj formantaj la civilizon, kiu mem estas unueca, tutmonda (...).

Ni multon devas lerni unuj de aliaj homoj kaj nacioj, anstataŭ nin reciproke masakri. Do, ia politiko de konsento por Frateco en internaciaj rilatoj, en kiu ekzemple sporto kaj zorgoj pri la medio aktive partoprenu en la vivo, en la elvolviĝo de popoloj kaj de landoj. **Ni estas komplementaj estuloj**. Iam estonte oni komprenos tian realaĵon, kaj oni efike, solidare ĝin travivos. Kontraŭe, okazos al la Homaro regado de malamo, konscia kaj senrespondeca ekstermado tra la tuta mondo, krom malmultaj esceptoj, ĉar ĉiam ekzistas solvo, kiam ekzistas Bona Volo kaj sekve ekumenismo de Paco en la koroj.

## La dezerto de romianoj

Parolante al portugala ĵurnalistino **Ana Serra**, en la jaro 2008, okaze de lanĉo de mia verko *Meditadoj el la Animo* en la lando de Camões, mi komentis:



Ana Serra

En la mondo, oni surtronigis la monan kapitalon kaj oni forgesis tion, kion mi nomas **Kapitalo de Dio**, nome precize la homo kaj lia Eterna Spirito.

[Aŭ la Eterna Spirito de la homo, ĉar Animo, nia etera parto, estas la plej grava. Ĝi antaŭas la korpon.]

La Animo, kiu antaŭas la formiĝon de la korpo, kvankam tion multaj homoj ne scias, estas la centro de **Ekonomio, la plej spirita el la sciencoj**, kiel mi argumentis en intervjuo al *Folha de S.Paulo*, en la jaro 1982.


[La Spirito venis antaŭ la formiĝo de la korpo, same kiel, okaze de la granda eksplodo (*big bang*) — kiu laŭ la moderna fiziko estigis la Universon — energio venis antaŭ materio.]


En la verko *Meditadoj el la Animo*, →














***Administri sian propran hejmon, instituciojn, entreprenojn kaj naciojn signifas alveni anticipe. Tio estas, kun decidemo kaj efika sinteno klopodi antaŭi la okazaĵojn, eviti malfacilaĵojn kaj eĉ starigi realĝustigon de vojoj, fronte al riskoj, kiuj montriĝas sendepende de tempo aŭ loko.***





UN Photos/Michos Tzovaras

Rio-92 kontribuis por solidigo de koncepto pri daŭripova elvolviĝado

*Ankoraŭ eĥiĝas tra la mondo la admono de Tacito (55-120), origine aplikita al romianoj, pro ilia frakasado en Kartago:*

*— Solitudinem faciunt, pacem appellant (Vi kreis dezerton kaj nomas ĝin paco).*

→ mi skribis ankaŭ pri "progreso de detruado", plenumata de tiuj, kiujn instigas avido gajni je ia ajn kosto, kiuj ne perceptas, ke ili metas sub riskon sin mem, sian familion, sian patrolandon kaj la mondon mem, tia kia ni konas ĝin nuntempe. Ankoraŭ eĥiĝas tra la mondo la admono de **Tacito** (55-120), origine aplikita al romianoj, pro ilia frakasado en Kartago:


Arkivo BV

Tacito

— *Solitudinem faciunt, pacem appellant (Vi kreis dezerton kaj nomas ĝin paco).*

Precize, ĉar la Romiidoj frakasis Kartagon ĝis la fundamentoj. Kaj tion faras tiaj frenezuloj al la Patrino Tero nuntempe.

## Politiko de ĝusta sinteno

Se reveni al la intervjuo, kiun mi donis al la veterana Parisi, en la jaro 1981, necesas do atentigi la Homaron. **Administri sian propran hejmon, instituciojn, entreprenojn kaj naciojn signifas alveni anticipe. Tio estas, kun decidemo kaj efika sinteno klopodi antaŭi la okazaĵojn, eviti malfacilaĵojn kaj eĉ starigi realĝustigon de vojoj, fronte al riskoj, kiuj montriĝas sendepende de tempo aŭ loko.**

## Oni multon povas lerni kun la proksimulo

Neniam antaŭe estis tiel nepre necese kiel nun kunigi strebojn de ekologiistoj kaj de ties kritikantoj, same kiel de laboristoj, entreprenistoj, amaskomunikantoj (skribe, parole, televide, kaj nun mi inkluzivas interreton), sindikatistoj, politikistoj, militistoj, advokatoj, sciencistoj, religiuloj, skeptikuloj, ateistoj, filozofoj, sociologoj, antropologoj, artistoj, sportistoj, instruistoj, kuracistoj, lernantoj kaj nelernantoj (ni ja dezirus, ke ĉiuj troviĝu sur lernejaj benkoj), domomastrinoj, familiestroj, barbiroj, manikuristinoj, taksiistoj, stratbalaistoj, kaj ceteraj partoj de la socio, por batalado kontraŭ malsato kaj por konservado de Vivo sur la mondo.

Tiu temo fariĝis tre emociiga, kaj ĝiaj perspektivoj, tragikaj. Pro tiuj samaj kialoj, urĝas plifortigi ekumenismon, kiu **transpasu barojn, kvietigu malamojn, starigu interŝanĝadon de spertoj, kiuj instigas tutmondan kreemon**, kaj tio konfirmos la valoron de soci-humanisma kunlaborado **per partnerecoj**, kiel ekzemple ĉe **popolaj kooperativoj, en kiuj ankaŭ virinoj forte agadu**, se oni elstarigas la fakton, ke ili estas emfaze kontraŭaj al malŝparado. Oni vere multon povas lerni kun la proksimulo. La mala vojo sendube estas tiu de perforto, de brutaleco, de militoj, kiuj invadas hejmojn tra la tuta mondo.

**Resume:** kiam ne plu ekzistos arogantemo aŭ antaŭjuĝoj, ĉiam ekzistos io por lerni kun ĉiuj partoprenantoj en ĉi tiu Arkeo de Noa, nome nia mondo.

* * *

## Batalemaj homoj

Miaj fratinoj kaj miaj amikoj, miaj amikinoj kaj miaj fratoj, mi finas ĉi tiun mesaĝon — kiun mi humile direktis al vi ĉiuj, kiuj honoras min per via legado — per vortoj, kiuj estas parto de mia nova verko, *Jesuo, la Dia Profeto*:

Por ke nia planedo postvivu la rezultojn de tiom da avido dum jarcentoj, se diri la veron, ni vidas rimarkindajn klopodojn de esploristoj kaj de civitanoj, kiuj strebas por plibonigi la vivkvaliton en la tuta mondo. Kune kun iniciatoj, kiuj celas sanigan nutradon, per organike natura agrikulturo, alternativaj transportiloj kaj protektado de la medio, per reciklado kaj racia manipulado de rubaĵoj kaj kaptado de pluvakvo, bonegaj studaĵoj de sciencistoj kaj de aliaj esploristoj esperigas bonajn rezultojn, kaj post nelonga kaj post longa tempo. Ekzemple, oni intense


João Periotto

esploras la kampon de energio, precipe koncerne renovigeblajn, purajn fontojn: biologi-bruligaĵoj, biologi-materio, blua energio, geologi-terma energio, hidraŭlika energio, akvoelektro, suna energio, marmova energio, ondoenergio, ventoenergio, krom aliaj studobjektoj nemulte konataj kaj tiuj, pri kiuj ni eĉ ne scias ankoraŭ, ke oni eltrovos ilin. **Fido estas la bruligaĵo de Bonaj Agoj**.

## "Ili ne forkuras el la areno"

Mi devas konscience elstarigi la bataleman klopodadon por la kaŭzo de mediprotektado, fare de institucioj registaraj kaj el la civila socio, seriozaj kaj aktivaj, en Brazilo kaj en la mondo; fare de amasoj da idealistoj, kiuj ne "forkuras el la areno", sed plu staradas sur la fronto, batalante por ia efektive pli bona planedo.

Nia alvoko estas ĉi tiu: **Eduki. Konservi. Postvivi. Kiel homoj ankaŭ ni estas la Naturo.**

*Nia alvoko estas ĉi tiu: Eduki. Konservi. Postvivi. Kiel homoj ankau ni estas lă Naturo.*


Lucian Fagundes

# RIO-92
# FIRMIGAS LA KONCEPTON PRI DAŬRIPOVA ELVOLVIĜADO

Leila Marco



Antaŭ dudek jaroj, la mondo komencis pli bone kompreni la seriozajn rezultojn de klimatŝanĝo okazantaj en nia mondo. Multo el tia ekkonsciiĝo, oni povas diri, rezultas de la Konferenco de Supera Instanco de Unuiĝintaj Nacioj pri Naturmedio kaj Elvolviĝado, nome Rio-92, en Rio-de-Ĵanejro (Brazilo). Tiu kunveno alportis al nia ĉiutaga vivo la defendon de modelo de "daŭripova elvolviĝado" — kaj tiu koncepto estis tiam ĵus kreita kaj ĝis nun ankoraŭ ne tute komprenata —, danke al la aktiva partoprenado de organizita civila socio. Tiutempe, miloj da aktivuloj kaj simpatiantoj pri socio-mediaj ideoj partoprenis en la ĉefa paralela evento: Tutmonda Forumo, en kvartalo "Aterro do Flamengo".

La supera kunsido en Rio kontribuis por efektiva progreso rilate la unuan internacian konferencon pri tiu temo, kiu okazis en Stokholmo, Svedujo, en la jaro 1972. La diskutado atingis novajn dimensiojn kaj la konvinkiĝon, ke ekonomia kreskado devas atenti limigon rilate elĉerpiĝon de naturaj rimedoj kaj la danĝeron, kiun tio signifas pri la vivo sur la planedo.

Tiun eventon markis ankaŭ la fakto, ke ĝi kunvenigis plej grandan kvanton da ŝtatestroj en la tuta Historio. Ĉeestis la kunsidon en Rio 117 ŝtatregantoj. La konferenco distingiĝis krome pro la subskribo de gravaj traktaĵoj kaj interkonsentoj, interalie la Agendo 21 kaj la Konvencio pri Klimato, kaj la kreo de Fondaĵo por Naturmedio (legu pli pri tiu temo en paĝo 66).

## Kampanjo de LBV elstariĝis en la konferenco

Dum Rio-92, Legio de Bona Volo lanĉis Kampanjon *Ankaŭ homoj estas animaloj. Protektu la brazilan infanon.* La reago de la socio estis tuja. Kun apogo de la amaskomunikiloj kaj aliĝo de preskaŭ cent brazilaj artistoj, tiu iniciato atingis signifoplenan sukceson. Ĝia precipa celo estis veki la popolojn por la urĝa bezono investi rimedojn en la estontecon de la plej grava estulo en la Naturo: infano. Pri ĝi oni esperas, ke konstruiĝos pli bona mondo, pere de Edukado por Paco kaj pere de konceptoj, kiuj privilegiu naturmedian konservadon. Tiu kampanjo, kiun elvolvis propagandagentejo DPZ, gajnis premiojn Ora Leono, en Festivalo pri Propagando en Cannes, Francujo, kaj Ora Koko, en Festivalo de Gramado, Brazilo, ambaŭ en la jaro 1993.

Ankaŭ antaŭ du jardekoj, la Institucio pionire atentigis pri la fakto, ke la diskutado pri naturmedio devas inkluzivi ekonomian kaj socian pilierojn, ĉar estas neeble diskuti pri daŭripova elvolviĝado kaj zorgado pri naturmedio sen konsidero pri la urĝa bezono elpreni el ekstrema malriĉeco tiom da homoj dise sur la Tero.

## LBV ĉe UN

Por elvolvi programojn kaj projektojn por socia inkluzivigo kaj daŭripova elvolvado, LBV starigas duflankan kunlaboron kun agantoj el


shutterstock.com




Adriana Rocha

En la Altnivela Kunsido de Ekosok (2011), LBV prezentis Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano. De maldekstre, ambasadorino **Maria Nazareth Farani Azevêdo**, estro de brazila Konstanta Laborgrupo ĉe UN en Ĝenevo, Svisujo; **Danilo Parmegiani**, peranto de la diskuto; d-ro **Andrei Abramov**, estro de la Sekcio pri NRO-oj de UN/DESA; kaj pedagogiisto **Suelí Periotto**, superrigardanto de la pedagogia gvidlinio de LBV.

ĉefaj sektoroj de la socio (publikaj instancoj, entreprenoj, kiuj havas socio-median respondecon, internaciaj organizoj, lernejoj, komunumaj asocioj kaj aliaj neregistaraj organizoj). Partoprenantoj en tiaspeca iniciato havas kiel komunan trajton la spiriton de kunlaborado kaj kompromison pri solidareco, por la bonfarto de la proksimulo.

Legio de Bona Volo asociiĝis al Departemento de Publika Informado de UN (DPI), organo de Unuiĝintaj Nacioj, ekde la jaro 1994. En 1999, ĝi estis la unua brazila institucio, kiu ricevis la statuson de ĝenerala konsultanto en la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN (Ekosok), per unuanima voĉdonado fare de komitato el 28 landoj-membroj. Pro sia sperto dum pli ol ses jardekoj en diversaj kampoj de la socio, kaj kun internacia disvastiĝo, LBV frate konstante defendas la rekomendojn por starigado de internaciaj publikaj agoj. En la sekva jaro, ĝi ekpartoprenis la Konferencon de NRO-oj kun Konsultaj Rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj (Kongo) kun sidejo en Vieno, en Aŭstrujo.

En la jaro 2004, ĝi kunfondis la Komitaton de NRO-oj pri Spiritualeco, Principoj kaj Tutmondaj Interesoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. En 2010, Legio de Bona Volo en Usono inaŭguris novan oficejon por reprezentiĝo en Novjorko. Per ĉi tiu plia agado, ĝi fortigas la aktivan voĉon de latinamerika civila socio koncerne demandojn en Unuiĝintaj Nacioj, aparte en Ekosok.

## Pli agema civila socio


Dum la lasta jardeko, kreskis la partopreno de reprezentantoj de la civila socio ĉe plej gravaj konferencoj aŭspiciitaj kaj apogitaj de UN. Tia estas la situacio de LBV, kiu laboras efektive per kampanjoj, reciproka kunlaborado, fakaj laborgrupoj kaj soci-edukaj programoj, por stimuli daŭripovan elvolvadon.

Dum tiuj eventoj, tiu Institucio konstante kontribuas per gravaj dokumentoj kaj publikigaĵoj eldonataj en diversaj lingvoj kaj transdonataj al ŝtatestroj, ministraj konsilistoj kaj reprezentantoj de la civila socio. El tiuj materialoj menciindas la revuoj *Solidara Socio, Paco por la Jarmilo, Tutmondigo de la Frata Amo,* BONA VOLO *Virino* kaj BONA VOLO *Edukado*. Ĉi tiun lastan oni transsendis al la Altnivela Kunsido 2011, en Palais des Nations, nome la centra oficejo de UN en Ĝenevo (Svisujo), kaj ĝi akceptiĝis tre entuziasme flanke de aŭtoritatuloj.

La partopreno de LBV en tiu evento en Svisujo ripetis tion, kion ĝi faris en antaŭaj okazoj kaj honoris la nomon de Brazilo ĉe UN. En faka panelo organizita en ĝia oficiala programo, la eduka gvidlinio de Legio de Bona Volo (kiu inkluzivas Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano), por kiu ege rekomendas la edukanto Paiva Netto, vekis la atenton de aŭtoritatuloj kaj de internaciaj grupoj tie ĉeestantaj, pro la rezultoj atingataj en lernejoj kaj en unuopaj socio-asistaj eroj de la Institucio: favora etoso por Kulturo de

Pedro Periotto




Adalgiza Periotto

En Ĝenevo, aŭtoritatuloj ĉeestis la kunsidon de *High-Level Segment* 2011 kaj ricevis de reprezentantoj de LBV specialan publikigaĵon de la Institucio por tiu evento: BONA VOLO *Edukado*. Inter ili (1) estis la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, **Ban Ki-moon**; (2) **Nikhil Seth** (maldekstre), direktoro de Departemento de Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de UN, kaj **Asha-Rose Migiro**, vic-ĝeneral-sekretario de Unuiĝintaj Nacioj; kaj (3) **Irina Bokova** (dekstre), ĝenerala direktoro de UNESKO, kiu interparolas kun **Angélica Periotto**, el LBV, pri la noviga pedagogia propono de tiu Institucio.




Noys Rocha

Paco, nula kvanto da antaŭtempaj forlasoj kaj individuoj kompromisiĝintaj kun la principoj de plena civitaneco (legu pli pri tiu pedagogia propono de LBV sur paĝo 42 de ĉi tiu revunumero).

## Reto Solidara Socio

LBV krome kunlaboras kun ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj* (JEC), pere de kunligoj inter pluraj sociaj agantoj, aŭspiciante renkontiĝojn kaj fakajn laborgrupojn, por disvastigado de informoj en urboj en Latinameriko kaj en Eŭropo. El tiu aro da agadoj aperis Reto Solidara Socio, nome movado, kiu konstante kunlaboras, je regiona nivelo, por intersektora, ampleksa agado, favore al integriĝinta, daŭripova elvolviĝo.




Jen estas publikigaĵoj eldonataj en diversaj lingvoj kaj transdonataj al ŝtatestroj, ministeriaj konsilistoj kaj reprezentantoj de la civila socio.

*Unu el la plej gravaj tutmondaj defioj, starigita en la jaro 2000, dum la Supera Kunsido de la Jarmilo, kaj konata kiel ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj. En ĝi kunvenis 191 landoj-membroj por difini aron da celoj atingendaj ĝis la jaro 2015, por plibonigi la vivkvaliton de la Homaro kaj certigi la daŭripovan konservadon de la mondo.

# LBV kaj naturmedio

Legio de Bona Volo partoprenas en grupo da institucioj, kiuj en la jardeko post 1960 jam perceptis la tujan riskon de gravaj naturmediaj kaj sociaj krizoj, pro konduto ofte egoista flanke de la homo, kiu ambicias riĉiĝi je ĉia kosto. Por helpi ŝanĝon en tia sinteno, LBV, ekde siaj komencaj paŝoj, laboras por Ekumena, Altruisma, Solidara Socio*, nome formulo konceptita por refari la nuntempan modelon de konsum-produktado, kiu jam elĉerpas la naturajn rimedojn. Ĉi tiu Institucio ĉiam fidas pri transformado per Amo, per Reala Frateco, kiel fonto de interkompreniĝo kaj levilo por publikaj agadoj por daŭripova progreso kaj socia inkluzivigo. *"En socio konstante minacata de detruo, indas rememorigi, ke ĉiutage, pro la falado de baroj spacaj kaj tempaj, la Teraj estuloj devas konsciiĝi, ke ili formas grandegan familion, nome la Homaron"*, diris la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto. Ĉi-sube, vi povas ekkoni kelkajn el la ĉefaj agoj de la Institucio survoje al tia konsciigo.



Arkivo BV


## Biologia diverseco kaj socia inkluzivado

De la jaro 1960, Komunuma Centro por Socia Asistado Alziro Zarur, de Legio de Bona Volo, en Glorinha, Brazilo, estas unu el la modelaj centroj de tiu Institucio. Ĝi staras en areo de preskaŭ 1 miliono da kvadrataj metroj, kaj la ensemblo havas samtempe fortan inklinon solidaran kaj ekologian. Laŭlonge de jardekoj, ĝi fariĝis referenca koncerne laboron por socia inkludado, kune kun naturmedia edukado, en kiu

---

*** Ekumena, Altruisma, Solidara Socio** — Koncepto por kiu pledas Paiva Netto jam de jardekoj, ripetita okaze de la 1-a Internacia Kongreso de Laboristaj Fratoj de Dio (okazinta je la 1-a de majo 1983, ĉe la sidejo de "Botafogo Futebol e Regatas", en la urbo Rio-de-Ĵanejro), kaj publikigita en diversaj organoj de la brazila kaj eksterlanda gazetaro.




**Glorinha, Brazilo – Konstanta zorgo de Paiva Netto estas plibonigo de la kvalito de servoj plenumataj de la Institucio. Pro tio, en la jardeko post 1990, li estigis grandan reformon kaj pliampleksigon de la Komunuma Centro por Socia Asistado Alziro Zarur, situanta ĉe Rodovia RS 30, km 19, Parada 119. Oni starigis kvar novajn konstruaĵojn por tranoktado, unu sportejon, kaj pliajn banĉambrojn, parkejon, festosalonon, tolaĵolavejon, riparejon kaj industrian kuirejon. En la detalo, la historia foto farita en la jardeko post 1960 montras la unuan konstruaĵon de tiu centro, kiun nuntempe oni komplete refaris, kun aldono de multaj floroj kaj plantoj ĉirkaŭe.**




Fotoj: Liliane Cardoso

Glorinha, Brazilo



Glorinha, Brazilo

homoj lernas interrilaton pli konstruan kaj harmonian kun la Naturo. Proksimume 60% de tiu havaĵo konsistas el origina arbaro kaj el specioj kreskintaj post rearbarigado. En tiu efektiva oazo de biologia diverseco estas grandegaj eŭkaliptoj, centjaraj figarboj, kverkoj, jambuloj kaj brazil-lignoj; krom diversaj fruktarboj, kiel ekzemple gujavarboj, persikarboj, oranĝarboj, pomarboj, mangarboj, k.a.

En la spaco destinita al solidara laboro en la Komunuma Centro, oni elstarigas la programojn *LBV — Infano: Estonteco en Estanteco!* (kiu prizorgas knabojn kaj knabinojn 6- ĝis 12-jaraj) kaj *Loko por Kunvivado* (por adoleskantoj 12- ĝis 17-jaraj). Per tiu soci-eduka agado, centoj da infanoj kaj junuloj en situacio de socia risko havas la okazon frekventi kultur-metiejojn (pri muziko, arto, k.s.), profitante riĉaĵojn el la Naturo kaj recikleblajn materialojn; ili plenumas lud-agadojn kaj lernas Ekumenan Kulturon kaj ekologian agrikulturon (legomĝardenoj, fruktoĝardenoj kaj plantado).

Dum tiuj 52 jaroj da funkciado de Komunuma Centro por Socia Asistado Alziro Zarur, zorga konservado de tiu areo faris la lokon ia sanktejo por plantoj kaj bestoj. Kondiĉoj necesaj por la vivo garantiis, ke sennombraj birdoj kaj aliaj indiĝenaj bestoj revenis.

# Solidaraj mobilizoj

Pro iniciato de Paiva Netto, dum la jardekoj post 1980 kaj 1990, oni vidis sinsekvon da alvokoj kaj publikaj manifestacioj por konsciigo pri la bezono konservi la naturmedion. De nordo al sudo en nia lando, Legianoj de Bona Volo de diversaj generacioj paradis surstrate kaj alportis al la socio standardojn pri la Kampanjo *La detruo de Naturo estas la estingo de Homa Raso*, kiun LBV ĝis nun plu tenadas.

São Paulo, Brazilo

Arkivo BV




João Preda






Vivian R. Ferreira

Foz do Iguaçu, Brazilo

# Pli verdaj urboj

Por harmoniigi Naturon kaj betonon, la ĉefgvidanto de LBV atentas, ke oni devas krei en la soci-edukaj unuopaj centroj de tiu Institucio (lernejoj, komunumaj centroj por socia asistado kaj hejmoj por maljunuloj) lokojn por legomĝardeno kaj florĝardeno, kun oportuna aerumado, lumo kaj beleco. Ĉi tiu iniciato vekas en lernantoj kaj asistatoj zorgemon pri la naturmedio.




Vivian R. Ferreira

Manaus, Brazilo

Anápolis, Brazilo




Salvador, Brazilo




Tatiane Oliveira

## Infana ĉefrolo

Praktikado de tutplaneda civitaneco ekde la unuaj jaroj de infanaĝo. Tiel Legio de Bona Volo agadas kun infanoj. En la jaro 2008, dum la 5-a Internacia Forumo de la Soldatetoj de Dio, de LBV, en brazilaj kaj alilandaj urboj en Sudameriko, Usono kaj Portugalujo, tiu homgrupo povis proponi kaj pridiskuti la temon "Mia domo estas planedo Tero". La precipa celo de tiu iniciato estis konsciigi novajn generaciojn pri la urĝo zorgi pri naturmedio.

Arkivo BV




Montevideo, Urugvajo

Rosângela Guedes



Londrina, Brazilo

Helena Caetano



Ribeirão Preto, Brazilo

## Sociaj teknologioj

Strebado al ekvilibro inter naturmedia protektado kaj soci-ekonomia progreso direktas la agadon de Legio de Bona Volo jam de jardekoj kaj tiu estis la precipa punkto en la laboroj de la 5-a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 2-a Foiro pri Novigoj, inter la 4-a kaj la 19-a de marto 2008, en brazilaj kaj argentinaj urboj. Realigita de LBV, tiu sinsekvo da renkontiĝoj produktis interŝanĝon de spertoj kaj disvastigon de bonaj praktikoj. La rezulto liveris elementojn por raporto ellaborita de la Institucio, kiun oni prezentis kun rekomendoj dum la Altnivela Kunsido de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok), de la 30-a de junio ĝis la 3-a de julio en tiu jaro, ĉe la sidejo de UN en Novjorko (Usono). Tiam, la Institucio alportis al UN bonajn praktikojn de pli ol 1600 organizoj el Latinameriko.

Tiu iniciato ricevis apogon de la Departemento de Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN/Desa) kaj apogon kaj aprobon de Centro por Informado de Unuiĝintaj Nacioj en Brazilo (UNIC Rio). Tiu sinsekvo da eventoj pritraktis novajn sociajn teknologiojn koncerne temojn kiel konservado kaj prizorgado de arbaroj, daŭripova elvolviĝo kaj klimataj ŝanĝoj, akvorimedoj, sano kaj naturmedio, naturmedia edukado kaj solidaj rubaĵoj.

João Preda




Manaus, Brazilo



Álvares Machado, Brazilo

Paulo Albino



Florianópolis, Brazilo

Arkivo BV



Maringá, Brazilo

Arkivo BV



São Paulo, Brazilo

Beatriz Christina

# Junulara agado

Ekde sia fondiĝo (1950), LBV havas junulojn kiel agantojn por Paco kaj socia kaj naturmedia transformado. Inter tiucelaj iniciatoj, oni elstarigu la konstantan forumon por diskutoj kaj agado, en kiu oni elektas temojn rilatajn al la progreso de la homo kaj de lia Eterna Spirito. De junio 2007 ĝis junio 2008, per sinsekvo da kunvenoj, la junularo profunde diskutis la temon “Ami la Teron estas protekti la estontecon!”. Tiun aferon la junularo de LBV kondukis al plej diversaj kampoj de la brazila kaj tutmonda socio, kaj ĝi atingis kulminan punkton je la 28-a de junio 2008, okaze de la 33-a Internacia Forumo de la Agema Junularo de Bona Volo de Dio.

Tiam, la junuloj diskutis la vojojn por atingi per praktika maniero daŭripovan elvolviĝon. Por tio, ili kondukis la diskuton surbaze de kvar tezoj de la direktoro-prezidanto de LBV: *“La detruo de Naturo estas la estingo de Homa Raso”*; *“Progreso sen detruado”*; *“Ekonomio de Spirita kaj Homa Solidareco”*; kaj *“Tutmondigo de Frata Amo”.*


LBV



# Por iu pli bona mondo kaj por iu pli feliĉa Homaro

João Periotto

Tatiane Oliveira




Salvador, Brazilo

Juliana Bortolin




Londrina, Brazilo

Legio de Bona Volo, jam de pli ol ses jardekoj, pensas, ke eblas pli bona mondo, pli justa kaj daŭripova. Por ke tio fariĝu realaĵo, LBV laboras entuziasme ĉiutage. Nuntempe, ĝi ekzistas en pli ol 70 urboj, en la kvin brazilaj regionoj kaj tenadas aŭtonomajn bazojn en ses landoj: Argentino, Bolivio, Paragvajo, Portugalujo, Urugvajo kaj Usono. Entute, tiuj centroj — lernejoj, hejmoj kaj komunumaj centroj por socia asistado — formas reton, kiu prizorgas ĉiutage milojn da infanoj, adoleskantoj, plenkreskuloj kaj maljunuloj en situacio de socia aŭ/kaj persona risko.

La plenumataj laboroj, plifortigataj per kampanjoj por konsciigo kaj sociaj alvokoj, prezentas kiel apartaĵon la celon **eduki kun Ekumena Spiritualeco.** Tio estas, stimuli la praktikadon de universalaj principoj, kiel Solidareco, Frateco kaj Respekto.

Ĉi tiu renoviga propono celas aliigon de la socia situacio de homo, tiel ke ĝi helpas lin transpasi diversajn damaĝriskojn, krom faciligo al lia plena civitaneco kaj stimulado, ke li mem estu solidara aganto.

Pro tio, oni internacie rekonas la Institucion kiel unu el la plej grandaj homamaj movadoj en la mondo. Por garantii konstantan materian helpon kaj edukadon al miloj da homoj, LBV realigas grandegan operacion, sub la financado de donacoj fare

Vivian R. Ferreira



Belém, Brazilo


de kunlaborantoj kaj intersektoraj kunlaborantoj. Tio estas ebla danke al la kredindeco konkerita per travidebla administrado kaj rezultoj ĉiutage vidataj.

En la jaro 2011 ili estis pli ol 9,4 milionoj da asistoj kaj bonfaroj plenumitaj tra la tuta Brazilo. La natura inklino de LBV por servado kaj celebrado de Vivo manifestiĝas en ĉiu okazo, kiam venkas apogataj infanoj, adoleskantoj, plenkreskuloj kaj maljunuloj.

## Kompromiso por Edukado kaj daŭripova tenado

De la fondiĝo en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, je la 1-a de januaro 1950, Tago de Paco kaj Universala Kunfratiĝo, fare de radikomunikanto kaj poeto **Alziro Zarur** (1914-1979), Legio de Bona Volo pli kaj pli ampleksigas la atingon de siaj programoj por tuteca apogo al homoj. Tiel, kaj per sia konsulta rilato kun Unuiĝintaj Nacioj, ĝi kontribuas ankaŭ por daŭripova elvolviĝado de nacioj.

Kiam la ĵurnalisto, radikomunikanto kaj verkisto **José de Paiva Netto**, post Zarur, enposteniĝis kiel prezidanto de la Institucio, en la jaro 1979, li ampleksigis la edukan kaj homaman mision de LBV, per malfermo de modelaj lernejoj kaj komunumaj centroj por socia asistado. En tiuj centroj (por formala kaj neformala edukado) oni praktikas la



João Periotto


Leilla Tonin
La-Pazo, Bolivio



Eduardo Siqueira
Piracicaba, Brazilo


Leilla Tonin
Goiânia, Brazilo

Mônica Mendes




Belo Horizonte, Brazilo

Vivian R. Ferreira



Manaus, Brazilo

pedagogian proponon de la Institucio mem, konsistantan el Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano (vidu paĝon 42).

Tiel, LBV proponas alprenon de sistemo de instruado, kiu ne limiĝas al oficiala instrumaterialo, sed kiu povas ankaŭ stimuli novan konscion pri tutplaneda civitaneco, kio efikas je aliaj sferoj de la socio. Laŭ difino de Paiva Netto, kreinto de tiu pedagogia gvidlinio: *"Edukado estas temo ĉiam oportuna. Urĝas, ke ni ĉiuj disvastigu kaj alfrontu ĝin, kiel sekuran vojon, kiu malpliigas la socian distancon inter la sociaj klasoj. Ĝi estas ankaŭ saniga kontraŭveneno kontraŭ perforto, krimo, malsanoj kaj ĉio, kio nuligas la sanan kreskadon de popolo."*

La rezultoj de tiu eduka propono (elstarigante la nulan kvanton de antaŭtempa forlaso kaj neperfortema etoso) ofte vekas la atenton de edukistoj en Brazilo kaj alilande. Rekono pri tia evidenteco pri bona kvalito estigas invitojn por ke LBV kapabligu edukistojn kaj preparu apogmaterialon por edukaj institucioj, kiuj interesiĝas alpreni la novan pedagogian modelon. La esenco de tiu propono ĉeestas ankaŭ en kongresoj pri Edukado kaj atingas milionojn da hejmoj per radi- kaj televidprogramoj, retejoj kaj publikigaĵoj.

Arkivo BV



Bonaero, Argentino

Arkivo BV




Montevideo, Urugvajo



Vivian R. Ferreira

# Nia laboro

Sur la sekvaj paĝoj, la leganto havas la okazon koni iom pli la laboron plenumatan ĉe la socio--edukaj, unuopaj centroj de LBV: lernejoj, komunumaj centroj por socia asistado kaj ŝirmejoj por maljunuloj. La agado de la Institucio koncernas ankaŭ edukajn projektojn kaj kampanjojn por konsciigo kaj plivalorigo de la Vivo en la amaskomunikiloj. Tiu tuta agado — surbaze de spirito de Solidareco — investas rimedojn je reedukado de la homo, vekante en li fratajn principojn.

***LBV naskiĝis por ami kaj esti amata!***

# Forigo de malriĉeco

## Komunumaj Centroj por Socia Asistado

En tiuj socioasistaj unuopaj centroj, la prizorgado de homoj kaj familioj en situacio de risko kontribuas por forigo de malriĉeco kaj por plivastigo de Solidara Ekonomio. Oni elvolvas kapablojn, talentojn kaj principojn per produktpova inkluzivado kursoj, socioedukaj agadoj kaj atelieroj por produktado de mongajno. Tiel, la asistatoj ricevas plibonigon de sia memestimo kaj komencas uzi siajn rajtojn kiel civitano, kaj tiel fariĝas agantoj por daŭripova elvolvado. Tiu laboro de LBV fariĝas per la jenaj programoj:


Maringá, Brazilo


Paulo Araújo


Lucian Fagundes

São Paulo, Brazilo


Juliana Bortolin

Londrina, Brazilo


Vânia Bandeira

Aracaju, Brazilo

## LBV — Infano: Estonteco en Estanteco!

Tiun programon partoprenas infanoj 6- ĝis 12-jaraj, kiuj restas en la Komunumaj Centroj por Socia Asistado ekster la lerneja instruperiodo. Tiu iniciato kontribuas al elstarigo de infanoj, konsidere al vivhistorio kaj apartaj trajtoj de infanoj, kaj stimulas aktivecojn, kiuj estigas kompetentecon kaj kapablojn.

LBV tiel trankviligas gepatrojn, per forigado de knabinoj kaj knaboj el riskaj situacioj, kaj samtempe estigas en ilin etikajn kaj spiritajn principojn. Per tio la Institucio stimulas integriĝon de la familioj.



João Pessoa, Brazilo

## Indiana Kulturo

En la urbo João Pessoa, en Brazilo, knaboj kaj knabinoj prizorgataj de LBV vizitis je la 24-a de aprilo 2012 la 1-an Ekspozicion Vivanta Kulturo — "Potiguara"-Popolo kaj "Tabajara"-Popolo en la subŝtato Paraíba, okazinta en Stacio Cabo Branco — Scienco, Kulturo kaj Artoj. Tiu ekspozicio celebris la Tagon de Indiano, kiun oni memorigas en Brazilo je la 19-a aprilo kaj partoprenis en la programeroj de Monato de Indiana Konscio. Tiuokaze, infanoj de LBV partoprenis rondon de interparolo kun indianoj, kiuj parolis pri siaj devenoj kaj tradicioj. Por la infanaro, ĝi estis praktikado de civitaneco kaj kulturakiro.





Fotoj: Jean Carlos



Cascavel, Brazilo

Vivian R. Ferreira

## Civitano-Bebo

Kun la celo plibonigi la vivkvaliton de infanoj kaj de patrinoj, ĉi tiu programo de LBV asistas gravedulinojn kaj virinojn, kiuj havas idojn en la aĝo ĝis 1-jara. Orientado kaj interŝanĝo de spertoj pri la graveda procedo, krom prizorgado de familioj, estas parto de la agado. Ĉi tiu laboro celas ankaŭ elvolvadon kaj ekvilibradon de familiaj interrilatoj. Partoprenantinoj kalkulas je socia kaj psikologia asistado, jura apogo, prelegoj kaj terapioj.



Sandra Teixeira

Vitória, Brazilo

## MULDADO DE LA VIVO, REKREI BONAJN IDEOJN

Ĉi tiu projekto proponis la temon pri rubaĵoj kaj naturmedio, por diskutado inter infanoj prizorgataj de LBV en la urbo Vitória, Brazilo. Per amuza maniero, ili kreis vestaĵojn kaj lernis novajn praktikojn kaj tendencojn por travivi la ĉiutagan vivon. Ĉi tiu projekto inkluzivis ankaŭ prelegojn kaj piediradojn por kolekto de reciklebaj materialoj en la komunumejo.



Fotoj: Jenny Manilla

El Alto, Bolivio



El Alto, Bolivio

## ATELIERO POR METILABOROJ KAJ STRASO

Legio de Bona Volo alportis sociasiston al la distrikto San Miguel, en la kampara regiono ĉirkaŭ El Alto, urbo situanta je 50 kilometroj for de La-Pazo, ĉefurbo de Bolivio. Pro tiu iniciato, la vivkvalito de multaj familioj pliboniĝis. Ili daŭre lernadas teknikojn de metilaboro, kiuj ebligas mongajnon per komercado de strasoj, floraranĝoj kaj produktado de balailoj, per reuzado de plastaj boteloj (foto).

# Loko por Kunvivado

Ĉi tio helpas la soci-kulturan integriĝon kaj plifortigon de civitaneco inter adoleskantoj, plenkreskuloj kaj maljunuloj. Ĝi donas favoran etoson por konstruado de interpersonaj, intergeneraciaj kaj familiaj ligiĝoj, per grupaj aktivecoj, sportaj eventoj, terapioj, k.t.p..


Juliana Bortolin

Londrina, Brazilo


Paulo Araújo

Maringá, Brazilo

## INTERPAROLI PRI LA NATURMEDIO

En la urbo Maringá, Brazilo, infanoj en programo *LBV — Infano: Estonteco en Estanteco!* diskutas proponojn por plejeble malgrandigi damaĝojn al la naturmedio en sia urbo.


Arkivo BV

Paranaíba, Brazilo

## RUBAĴO KAJ METILABORO

En la urbo Paranaíba, Brazilo, asistatoj de LBV montras saman emon por reutiligi materialojn, kiuj destiniĝus al rubejo, kaj produktas ornamobjektojn per ili. Metie labori uzante skatolojn de nutraĵoj, potojn, pecojn de tolaĵoj, ekzemple, rezultis tiel pozitive, ke tiu iniciato daŭre helpas kelkajn familiojn, kiuj partoprenas la programon *Loko por Kunvivado,* de la Institucio, por kompletigo de la familia mongajno.




Foz do Iguaçu, Brazilo

## KONO KAJ KONSERVADO

(1) Infanoj prizorgataj de LBV vizitis la Akvofalojn Iguaçu, tutmonde konatajn kaj konsideratajn kiel unu el la sep novaj mirindaĵoj en la Naturo. Ĝi estas unu el la plej grandaj grupoj da akvofaloj en la tuta mondo, kaj foje atingas akvofluon de po 8,5 milionoj da akvolitroj en ĉiu sekundo, kiam estas sezono de pluvoj. Akompanate de sociedukistoj de la Institucio kaj turismogvidantoj de Nacia Parko Iguaçu, la etuloj trairis la ĉefajn observejojn tiuloke.

(2) La promeno inkluzivis viziton al Parko de la Birdoj, proksime al la akvofaloj. Tiu loko ricevas de Brazila Instituto por la Naturmedio kaj por Naturaj Renovigeblaj Riĉaĵoj (IBAMA) bestojn, kiuj suferis mistraktadon aŭ kiujn oni rekaptis dum operacioj kontraŭ neleĝa trafiko. Tie, tiuj birdoj ricevas la necesan prizorgadon por resaniĝo. *"Mi lernis, ke oni devas prizorgi la bestojn kaj respekti la Naturon, ĉar sen Naturo ni ne ekzistus"*, nome de ĉiuj resumas **Mariele Miller**, 8-jara.

Fotoj: Vivian R. Ferreira






Brasília, Brazilo

## SEKURECO EN NUTRADO

Apogite de programo *Tablo Brazilo*, de SESC (Socia Servo de Komercistoj), LBV konstante orientas homojn asistatajn de la Institucio, en la tuta Brazilo, pri tio, kiel profiti pli bone la nutraĵojn kaj eviti perdojn pro neglekto. Oni instruas receptojn, kiuj uzas ŝelojn kaj foliojn de fruktoj, legomoj kaj nutraj herboj, kiuj estas kutime forĵetataj, sed enhavas grandan kvanton da nutraĵoj. Danke ankaŭ al tiu kunlaboro, kromrestantaj nutraĵoj, aŭ nutraĵoj ekster la komercaj postuloj, sed konsumeblaj, alvenas al la kuirejoj de pluraj unuopaj centroj de LBV, kaj ili plifortigas la nutradon de miloj da homoj en situacio de socia risko.




Pelotas, Brazilo


En la urbo Pelotas, Brazilo, *Eblas Recikladi*, de LBV, celas konsciigi infanojn, adoleskantojn kaj plenkreskulojn pri la graveco selekte kolekti rubaĵon kaj reprofiti parton de la materialo. La asistatoj lernas transformi plastajn botelojn, skatolojn kaj alispecajn pakaĵojn en uzeblajn objektojn, kiel potoj, ujoj, ludiloj, ornamobjektoj kaj taburetoj. *"En multaj urboj inundojn kaj terglitojn ofte kaŭzas rubaĵoj fuŝe ĵetitaj surstrate"*, asertis volontulino **Isis Zibett,** kiu helpas elvolvi tiun iniciaton.

## Kapabligo kaj Produktopva Inkluzivado

La celo de ĉi tiu programo estas prepari junajn kaj plenkreskajn homojn por la labormerkato, per profesiigaj kursoj. En ĉi tiuj kursoj oni elvolvas kompetentecon kaj teknikan kaj personan kapablon, kiuj estigu (re)kondukon en la mondon de laboro kaj, sekve, mongajnon, je efika agado de Pedagogio de Ekumena Civitano (legu pli pri tiu temo sur paĝo 42).




Poços de Caldas, Brazilo




Bonaero, Argentino




Ponta Grossa, Brazilo




Vivian R. Ferreira

São Paulo, Brazilo

# Kampanjoj

Sinsekvaj kampanjoj por socia alvokado kaj por konsciigado plenumataj de Legio de Bona Volo en la tuta lando celas plivalorigon de Vivo, kun atento pri infanoj kaj pri familioj. Per tiaj iniciatoj, okazas dum la jaro aldonaj aktivecoj favore al tuteca elvolviĝo de la asistatoj.



São Paulo, Brazilo

João Periotto

## SOS Katastrofoj

Ĉi tiu estas kampanjo plenumata kunlabore kun la Civila Defendo kaj aliaj organoj kun apogo de volontuloj. Ĝi entreprenas tujajn, urĝajn agojn por prizorgi homojn kaj/aŭ komunumojn atingitajn de katastrofoj. Oni liveras esence gravajn varojn (neputriĝemaj nutraĵoj por tuja konsumo, trinkebla akvo, vestaĵoj, ŝuoj), materialon por persona higieno kaj por purigo kaj matracetojn, kaj krome oni plenumas urĝajn sanservojn.



Leilla Tonin

São Luís, Brazilo


Vânia Bandeira

Aracaju, Brazilo


Vivian R. Ferreira

São Paulo, Brazilo



Lucian Fagundes

# Konstanta Kristnasko de LBV — Jesuo, Nia Pano ĉiutaga!

Ĝi liveras kestojn kun neputriĝemaj nutraĵoj al familioj prizorgataj dum la jaro per socioasistaj programoj de LBV, al familioj prizorgataj de institucioj, kiuj partoprenas la Reton Solidara Socio kaj al tiuj, apogataj de organizoj kunlaborantaj kun Legio de Bona Volo.



São Paulo, Brazilo

Vivian R. Ferreira

# Infano 10-Poenta — Sen Edukado ne ekzistas Estonteco!

Ĉi tiu agado ekonomie bonfaras al gepatroj, kiuj ne havas rimedojn por aĉeti lernejan materialon. Komence de la lernojaro, oni liveras pli ol 12 mil ilarojn da pedagogia materialo al infanoj kaj adoleskantoj, kiuj frekventas lernejojn de baza edukado en la Institucio kaj al partoprenantoj de la programo *LBV — Infano: Estonteco en Estanteco!*. Rezultas de tio plibonigo de memestimo flanke de la prizorgatoj, krom stimulo al plua studado.



Manaus, Brazilo

Vivian R. Ferreira



Anápolis, Brazilo

João Preda



João Preda




Vivian R. Ferreira

Uberlândia, Brazilo

# Hejmo por maljunuloj

Tri unuopaj centroj de LBV akceptas maljunajn homojn en situacio de socia risko, en la urboj Volta Redonda, Uberlândia kaj Teófilo Otoni, en Brazilo. La tuta agado inkluzivas nutran prizorgadon, kuracistan kaj flegistan asistadon, terapiojn (korpan kaj laboran). La hejmoj en la Institucio servas laŭ du manieroj:

• **Longa Restado:** por maljunuloj, kiuj loĝas en la instituciaj hejmoj. Ili ricevas atenton kaj prizorgadon diurne. Tiu loko taŭgas por tiuj, kies familiaj ligoj rompiĝis, kaj/aŭ foriĝis el sia familia grupo pro juĝa decido. Tio celas restarigi tiajn ligojn kaj kunlabori por ke la asistatoj havu pli dignan, partoprenpovan, sanan vivon.

• **Potaga-Centro:** por homoj en la tiel nomata tria aĝo, kiuj restas en tiuj ejoj de lundo ĝis vendredo, de la 8-a ĝis la 18-a horo. Ĉiutage, post la 18-a horo kaj dum semajnfinoj, tiuj maljunuloj restas kun siaj familianoj. Per tia prizorgado, LBV celas konservadon de familiaj ligoj.



Patricia Oliveira

Teófilo Otoni, Brazilo



Nathália Valério

Volta Redonda, Brazilo

**Vizitu, enamiĝu kaj helpu LBV-on!**

Por informiĝi pri adresoj de unuopaj centroj de LBV kaj havigi al vi pliajn informojn pri la agado en ĉiu el ili, vizitu la retejon www.bonavolo.com




João Periotto

*"Estos vane — ni diru kiel argumenton — aŭdace plani, se ne estos homoj taŭge trejnitaj por tion plenumi."*

**Paiva Netto**

# La rolo de Edukado
## por la estonteco, kiun ni deziras

**Suelí Periotto**

João Periotto



Suelí Periotto [*1], superrigardantino de Pedagogio de Bona Volo (kiu konsistas el Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano), direktoro de Instituto pri Edukado José de Paiva Netto.

La eduka agado de Legio de Bona Volo prioritatigas la valorigon de persono kiel integra Estulo. Samtempe ĝi proponas ekumenan alternativon al la pedagogia modelo kiu foje supertaksas la elementon rezonado malprofite je la sociafekcia kaj intuicia enhavo. Tiu laboro portas pozitivan kontribuon al la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC), sociekonomia celaro subskribita de la ŝtatoj-membroj de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por esti plenumita ĝis 2015, ĉefe rilate la kampojn de edukado, sano naturmedio kaj enspezado.

Eduki kun Ekumena Spiritualeco estas la bazo de la pedagogia propono aplikata en la instrureto kaj en la sociedukaj programoj de Legio de Bona Volo. Tiucele, la Institucio baziĝas sur la Pedagogio de Amo (por infanoj ĝis 10 jaroj) kaj sur la Pedagogio de Ekumena Civitano (por aĝuloj ekde 11 jaroj), kreitaj de la direktoro-prezidanto de LBV, José de Paiva Netto. Kaj li mem asertas en sia libro *Urĝas Reeduki!*[*2]: *"Eduki signifas transformi. Reeduki, sub aŭspicioj de Paco, de Amo kaj de Justeco, vivigata per Bonkoreco, signifas sublimigi la homan karakteron".*

La pedagogia gvidilinio adoptita de LBV komprenas la edukaton kiel protagoniston en la konstruo-procezo de la kono kaj identigas en la instruisto tiun rolon de mediacianto serĉanta la konon. De tiu punkto, la lernanto trovas en la rimedoj disponigitaj al li la bezonantan helpon por sia individua disvolviĝo, kio plifortigas la deziron plu lerni kaj la

[*1] Suelí Periotto estas pedagogiistino kun post-diploma fakiĝo pri Lerneja Administrado kaj Metodologio pri Homaj Sciencoj, kaj magistra diplomo pri Edukado: Studodiplomo de PUC-SP, preleganto kaj prezentanto de la programo *Diskutoj pri Edukado*, per Superreto Bona Volo de Radio.

[*2] ***Urĝas Reeduki!*** — Ĝi estas furora libro de verkisto Paiva Netto, kiu jam vendiĝis je pli ol 230 mil ekzempleroj en Brazilo. Tiu verko estas disponebla ankaŭ kiel elektronika libro (en la portugala lingvo).




João Periotto

Gelernantoj de Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo, Brazilo, prezentas laboraĵon pri naturmedio.

devontigon je la valoroj pri Kulturo de Paco kaj daŭripova elvolviĝo.

LBV-lernanto akceptas, ke la fakto, ke li partoprenas malriĉajn komunumojn, ke li vivas en familia kondiĉo de malsekureco, tamen ne baras al li la eblecon fariĝi plena civitano. Eĉ pli: li scias, ke li mem, krom la kapablo persone kreski, povas integriĝi kiel multobliganto de tiu standardo de kontinua subtenado, agante per signifoplena maniero sur la pilieroj ekonomia, socia kaj media. Tiel, li ne nur partoprenas en la diskutado kaj serĉado de solvoj por favora impulso ĉe la loko, kie li vivas, sed krome li ampleksigas tiun zorgon al sia komunumo.

## Planeda civitano

Dum la ĉiutaga aktivado en la lernejoj kaj sociedukaj programoj de Legio de Bona Volo, la favoratoj estas stimulataj veki sian sociafektivecon kunligitan al sia intelekta edukado. Tiamaniere ili plibone komprenas sian rolon de civitanoj, siajn rajtojn, la bezonon de orientado por plenumo de siaj devoj.

De la lernanto oni esperas ke, post kompletigo de la baza edukado, li plene asimilis la koncepton pri Ekumena Civitaneco. Tiamaniere, do, li estos plibone preparita, tiel por sia profesia kariero kiel por la daŭrigo de la studoj, kaj sekve, kapabla kontribui al la disvolvo de socio pli humana kaj solidara. Post konatiĝo kun la malsamaj konoj akiritaj el la pedagogia enhavo, ekumene akorditaj kun la etikaj kaj moralaj valoroj, li sin preparas por kontentiga ensocietiĝo kaj eniro en la labormerkato, per maniero kreema kaj efektiva. La rezulto de tio estas la estigo de dignaj vivkondiĉoj por si kaj la daŭra plivastigo de streboj favore al la daŭripoveco de la planedo.

Dum la lernado de la junulo, speciala atento meritas lia prepariĝo por vivo celanta entreprenemon. La Pedagogio de Ekumena Civitano identigas la valoron de bonkvalita kleriga edukado kaj samtempe strebas plifortigi la konscion pri civitaneco ĉe adoleskantoj kaj plenaĝuloj, pere de travivado de fundamentaj valoroj por la familio kaj la socio. Por la edukato, temas pri oportuno akiri aktivan voĉon por partopreni la ellaboron de konceptoj, kiuj kreos la bazon mem de praktiko de tiu Ekumena Civitaneco.

Unu el la grandaj celoj de la pedagogia modelo diskonigata de la edukanto Paiva Netto estas estigi kondiĉojn por ke ĉiu lernanto vidu sin kiel gravan parton de socia grupo, dotita per kritikemo, lertecoj kaj sennombraj kapablecoj. Plifortigi la koncepton pri integra Estulo (konsistanta el la Spirita Inte-

ligenteco, preter la kogna kaj emocia aspektoj) estas determina faktoro por motivigo, ĉar tio helpas al la lernanto ne konformiĝi kun la nedecaj vivkondiĉoj. Li do ekvidas sian internan kapablon labori por produkti ŝanĝojn, plivastigi la horizontojn cele firmigi al si novan socikulturan realaĵon.

Kun sia memestimo plifortigita, la persono entuziasmiĝas partopreni aktivadojn kiuj helpas, ekzemple, konservadon de la medio kaj favorigas la komunumon kie li vivas. Kune kun la eblecoj pri lerno kaj informado, kreskas en la lernanto la percepto pri la realaĵo, en kiu li vivas, kaj pri la perspektivoj por ŝanĝoj je lia atingpovo.

## "La homo estas la grenejo de daŭraj realigoj"

La rezultoj atingitaj de la lernejoj de LBV estas bonegaj. Kun pli ol 60 jaroj da ekzisto, la Institucio registras indicon nulo de antaŭtempa forlaso en siaj edukejoj, tiel ke ĝi havigas medion sekuran kaj sen agresemo en la rilato inter la edukatoj kaj inter ĉi tiuj kaj la edukantoj. Nombro pli kaj pli granda de iamaj lernantoj daŭrigas siajn klerigajn studojn kun kreskantaj perspektivoj de persona evoluo.

La Institucio kredas kaj investas je la poveco de infanoj kaj gejunuloj. Tial, la laboro de LBV sekvas la vojon de bonkvalita edukado kaj de socialasista helpo, sub la lumo de la Ekumena Civitaneco. La sperto montras ke tiu vojo estas trairenda, ĉar ĝi garantias bonajn fruktojn, laŭ mezure kiom ni dediĉas nin al ĝia bonkvaliteco. Ni fidas al tio ke tiuj nuntempaj gejunuloj, morgaŭ plenaĝuloj, povas kaj ankoraŭ multon faros por nia planedo, komence per tia konsciiĝo ke eblas superi la defiojn.

Tial, nepras ke ili estu orientitaj per edukado kiu havigas *"ian rigardon trans la intelekto"*, kiel rimarkigas Paiva Netto. *"La homo, speciale la infano, estas la grenejo de daŭraj realigoj. Ĝi estas la vera trezoro de civilizacio; ne povas resti kruele ekspluatita, submetita al sklaveco kaj malŝato. Por li oni devas estigi kondiĉojn, eĉ la plej minimumajn, por digna vivo dum iu ajn epoko de lia ekzistado"*, preskribas la edukanto.

La kondiĉoj indikitaj de la ĉefgvidanto de LBV estas je nia atingpovo kaj estas realaĵo en la laboro disvolvita de Legio de Bona Volo. La socio tamen ankoraŭ atendas tujajn kaj efikajn agadojn en la kampo de edukado kaj civitaneco. Nepras firmeco dum pensado kaj Bona Volo dum agado. La estontaj generacioj, dankemaj, povos raporti pri multaj agadoj kaj teniĝoj celantaj la bonon de tiu blua planedo, sekve al vojoj malfermitaj de ni ĉiuj. Do, ek al laboro!

Por ekkoni pli pri la pedagogia gvidlinio de Legio de Bona Volo, por kiu pledas edukanto Paiva Netto, en Brazilo kaj eksterlande, la legantoj elŝutu QR Code en sian komputiltelefonon, fotu la kodon kaj havu la *Manlibron pri Pedagogio de Amo kaj pri Pedagogio de Ekumena Civitano*, de LBV, disponebla en la lingvoj hispana, franca, angla kaj portugala.



João Periotto



Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo, Brazilo, montras, ke altkvalita Edukado, Solidareco kaj Ekumena Spiritualeco estas nemalhaveblaj al formado de plena civitano. Tiaj principoj reflektas Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano, por kiuj ege rekomendas Paiva Netto kaj kiujn oni sukcese aplikas en la eduka reto kaj en soci-edukaj programoj de la Institucio. Sur la fasadon de tiu lernejo, la direktoro de LBV surmetis ĉi tiun maksimon de **Aristotelo**: *"Ĉiuj, kiuj pripensas la arton regadi la homan genton, fine konvinkiĝas, ke la sorto de imperioj dependas de edukado de la junularo."*

André Fernandes

# Altkvalita edukado

Laŭ multaj homoj, la estonteco de vivo sur la Tero dependas de la nuntempa konduto de la homo. LBV konsentas pri tio, kaj pro tio ĝi investas jam de pli ol 60 jaroj je altkvalita edukado de infanoj kaj junuloj, por ke ili havu ŝancon elvolviĝi kaj fariĝi civitanoj konsciaj pri siaj devoj kaj rajtoj en la socio.

La lernejoj de LBV havas la kompromison eduki kun Ekumena Spiritualeco, formante *"Cerbon kaj Koron"*, laŭ difino de la direktoro-prezidanto de tiu Institucio, José de Paiva Netto. Por tio, ili celas estigi altkvalitan kompetentecon kaj efikecon, en ĉiuj etapoj de la baza edukado, harmonian elvolvadon de inteligento, de korpo kaj de Spirito, por ke la lernanto plene kaj konscie travivu civitanecon, etikajn principojn kaj Solidarecon (sciu plu pri Pedagogio de LBV, sur paĝo 42).

La agado inkluzivas formalan lernejan instruadon kaj plivastiĝas al gravaj aspektoj de la vivo de la asistatoj. La temon daŭripova sintenado oni pritraktas per speciala maniero en la unuopaj edukcentroj de LBV. Per agado kaj edukaj projektoj, infanoj frue lernas pri la valoro konservi la Naturon, vivon kaj ekvilibran rilaton kun la naturmedio.

## Plantado de arboj

Gelernantoj de LBV, en San-Paŭlo, Brazilo, kuniĝas kun lernantoj de Kolegio Lebiste, kiu situas en la urbo Itapecerica da Serra, interne de subŝtato San-Paŭlo, por planti 70 arbidojn en la verda tereno de tiu edukcentro. Tiu iniciato estis omaĝo de la direktoro de tiu kolegio, **Luiz Paulino**, al la estro de LBV pro lia 70-jara datreveno kaj pro lia senĉesa laboro en homama kaj konsciiga helpado al naturmedio.

João Nery



Luiz Barcelos





## Helpu LBV-on realigi projekton

Alportu vian kontribuon persone al eduka ensemblo de Legio de Bona Volo, situanta ĉe Av. Rudge, 630/700, Bom Retiro, São Paulo/SP (Brazilo), aŭ donacu per retejo www.legionofgoodwill.org. Pliaj informoj per tel.: (+5511) 3225-4500.

# Projekto Fruktoĝardeno

Instrui infanojn kaj junulojn pri strebado al pli harmonia kunvivado kun la naturmedio. Tiucele, Instituto pri Edukado José de Paiva Netto en la ĉefurbo San-Paŭlo investas je konstruado de loko destinita al edukado pri naturmedio: bosko, kun 21 plurspeciaj arboj, multaj el ili fruktodonaj. Tie estos platformo por liberaeraj lecionoj kaj akva spegulo, ĉirkaŭbarita per arbustbarilo. Per tridimensia bildo, jen estas montro pri tio, kia estos la fruktoĝardeno en la interno de la lernejo.

Fotoj: Margarida Caroba





Arkivo BV



Belém, Brazilo

# Ekologiaj promenoj

Knabinoj kaj knaboj el la Eduka Centro Jesuo, de LBV, en la urbo Belém, Brazilo, okazigas ekologian promenon en Muzeo Paraense Emílio Goeldi, pli konata kiel Muzeo de Amazonio. Tiu agado faris, ke la infanoj konu de proksime speciojn el la faŭno kaj flaŭro, tipe regionajn, kaj ankaŭ konsciigis la infanaron pri la bezonataj zorgoj por konservado de naturmedio.




Vivian R. Ferreira

Rio de Janeiro, Brazilo

## Reciklado

En la Eduka Centro de LBV en la urbo Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, infanoj kaj junuloj en frua aĝo lernas recikladon por konservi la Naturon. Sub la stimulado de edukistoj, gelernantoj alvokas familiojn kaj la komunumon por alpreno de daŭripovaj agoj en la ĉiutaga vivo, kiel reuzado de papero kaj la ĝusta forĵetado de uzita kuiroleo. Se oni forĵetas ĝin en la kutiman akvoelfluejon, ĉi tiu restaĵo povas ŝtopi la tubojn de domoj kaj fariĝi kontaĝa faktoro en riverakvoj.

Vizitu, enamiĝu kaj helpu al LBV! En Rio, Brazilo, Eduka Centro José de Paiva Netto situas ĉe Av. Dom Hélder Câmara, 3059, Del Castilho. Pliaj informoj, tel.: (+5521) 2501 0247 aŭ vizitu la portalon www.bonavolo.com.



André Fernandes




Gisele Noronha




Fotoj: Vinícius Ramão

# Manetoj en la Teron

Kun la celo, ke infano pli ofte kontaktu la Naturon, krom stimulado al pli natura nutrado, per manĝado de legomoj kaj folioj, la Eduka Centro de LBV en la urbo Curitiba, Brazilo, elvolvas projekton *Manetoj en la Teron*. Sub la ĝenerala prizorgado de nutristino de LBV **Silvana Maria Seleme** kaj de instruistoj, la infanaro plantas legomojn kaj manĝeblajn foliojn kaj samtempe lernas la bonfarojn de tiuj nutraĵoj al sanstato.





Curitiba, Brazilo



Vizitu, enamiĝu kaj helpu al LBV! En la urbo Curitiba, Brazilo, Eduka Centro José de Paiva Netto situas ĉe strato Padre Estanislau Trzebiatowski, 180, Boqueirão. Pliaj informoj, tel.: (+5541) 3386-8430 aŭ vizitu la portalon www.bonavolo.com.




Plenumu vian parton!

## Sciu kie troviĝas LBV-on

**CENTRA SIDEJO:** Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.bonavolo.com • **LBV DE ARGENTINO:** Av. Boedo, 1.942 • C1239AAW • Buenos Aires • Tel.: (+5411) 4909-5600 • www.lbv.org.ar • **LBV DE BOLIVIO:** Calle Asunta Bozo, 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de Correo 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • www.lbv.org.bo • **LBV DE USONO:** 36 W 44th Street Mezzanine • Manhattan • New York • 10036 • Tel.: (+1646) 398-7128 • www.legionofgoodwill.org • **LBV DE PARAGVAJO:** Calle Curupayty, 1452 • Barrio Villa Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/3 • www.lbv.org.py • **LBV DE PORTUGALIO:** Comandante Rodolfo de Araújo, 104 • Bonfim • Porto • CP 4000-414 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt • **LBV DE URUGVAJO:** Av. Agraciada 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790 • www.lbv.org.uy

**Helpu! www.legionofgoodwill.org**

Banko Santander: Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6

Banko HSBC: Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24

# Amaskomunikado de Bona Volo:

## por daŭripoveco de korpo kaj de Spirito






Fotoj: Vivian R. Ferreira

Komuniki mesaĝon de Paco kaj Frateco, surbaze de universalaj principoj laŭ la ekzemploj de Jesuo, la Ekumena Kristo, estas kompromiso de Legio de Bona Volo ekde ĝia komenco (fine de la jardeko post 1940). Por plivastigi ĉi tiun kaj aliajn noblajn idealojn, la direktoro-prezidanto de LBV, **José de Paiva Netto,** kreis Superreton Bona Volo de Komunikado (radio, televido, interreto kaj publikigaĵoj).

Konsiderante la familion *"la koro de la mondo"*, ĉiuj amaskomunikiloj de la Institucioj de Bona Volo produktas materialon, kiu privilegias konsciigon kaj ŝanĝon de sintenoj de homoj rilate siajn proksimulojn kaj la medion, kie li vivas, harmonie kun Kulturo de Paco kaj daŭripova elvolviĝado. Kaj pensante ankaŭ, ke bonkvalita komunikado kontribuas al konstruado de iu pli bona mondo, ĝi stimulas la publikon alpreni kutimojn pli sanajn, ekologie respondecajn. Konu resumon de la precipaj avangardaj eroj, kiuj konsistigas Superreton Bona Volo de Komunikado.





### Superreto Bona Volo de Radio

Ĝi havas tutlandan atingon — estas 20 radistacioj, el kiuj 13 elsendas ĉiutage dum 24 horoj —, Superreto Bona Volo de Radio karakteriziĝas kiel pioniro en ĉiuhora elsendado de Ekumena Preĝo kaj varia programlisto. Ekde ĝia inaŭguriĝo, en la jaro 1992, momento de grandnombra aŭskultado estas ĉiam lecionoj pri Evangelio-Apokalipso de Jesuo, en klarigo de ĵurnalisto Paiva Netto. En tiu serio da programoj, aktualajn faktojn oni analizas laŭ la vidpunkto de Ekumena Spiritualeco, kiu atentigas pri la transformoj jam okazantaj en la mondo.



## Bona Volo TV

Bona Volo TV funkcias ekde la jaro 2000, kaj fariĝis konata kiel *“televido de Paco, de Amo kaj de Reala Frateco”.* Oni povas kapti ĝin per kanalo 23 de SKY kaj per portalo Bona Volo (www.boavontade.com). Ĝi havas varian, altkvalitan programaron — informadon, klerigadon kaj amuzadon, kun Ekumena Spiritualeco — kaj direktiĝas al ĉiuj generacioj, kontribuante al tuteca formiĝo de la homo.




## Revuo BONA VOLO

En la jaro 1956, oni prezentis la unuan eldonon de revuo BONA VOLO. Tiam, LBV ekzistis oficiale de ses jaroj. Tiu publikigaĵo naskiĝis kun la tasko informi kaj orienti, konsiderante bonfarton de korpo kaj animo de legantoj. Nuntempe, ĝi plu elstarigas faktojn kaj ekzemplojn de agadoj, kiuj koncernas principojn kiel Frateco kaj Solidareco, krom registrado de progresoj en Scienco kaj Edukado, kultureventoj kaj iniciatoj de zorgado pri la naturmedio.



## Interreto

De la jaro 1996, kiam komenciĝis la monda reto en Brazilo, Legio de Bona Volo publikigas diversajn paĝarojn (inkluzive de nuntempaj oficialaj partoprenoj en sociaj retejoj), kiuj havas la kompromison reciproke kundividi bonajn praktikajn solvojn por konstruado de iu pli bona mondo. El tiuj retejoj, oni elstarigu portalon Bona Volo (www.boavontade.com), disponeblan en 11 lingvoj. En ĝi, retumanto aktualiĝas pri ĉefaj temoj de la ĉiutaga vivo kaj pri temoj ligitaj al naturmedio, al sano, al edukado kaj al daŭripova elvolviĝado.





## Solidara komunikado

Dum la lastaj kvin jardekoj, la direktoro-prezidanto de LBV elstariĝis en la kampo de komunikado: krom sukcesa verkisto kaj radikomunikanto, Paiva Netto fariĝis influa ĵurnalisto. Dum tiu tempo, oni kalkulas, ke ĉirkaŭ du mil amaskomunikiloj, ĉu paperaj, ĉu interretaj, jam spontane disvastigis liajn tekstojn (en dekoj da lingvoj), kiuj celas precipe praktikadon de kampanjoj favore al Vivo, per stimulado al Ekumena Frateco.

## TV Reeduki — Reto Edukado kaj Estonteco de Televido

Je la 21-a de septembro 2003, la estro de LBV inaŭguris TV Reeduki, je kanalo 11 VHF kaj kanalo 400, edukproduktanton de Fondaĵo José de Paiva Netto (FJPN), kiu produktas kaj elsendas sian programaron al la urbo São José dos Campos kaj ĉirkaŭaĵoj. TV Reeduki investas je neĉeesta edukado kiel unu el la strategioj por demokratiigi kaj plialtigi la kvaliton de brazila edukado.






João Miguel

Ribeirão Preto, Brazilo



Vivian R. Ferreira

Pouso Alegre, Brazilo



Salvador, Brazilo

Nino Santos




Lucian Fagundes

# LBV celebras




Maringá, Brazilo

Paulo Araújo




João Periotto



Vivian R. Ferreira

São Paulo, Brazilo




Vivian R. Ferreira


Santa Maria Madalena, Brazilo

João Periotto


Taguatinga, Brazilo


Curitiba, Brazilo

Vinícius Ramão

# kun Brazilo

## *pli ol 9,4 milionojn da asistoj kaj bonfaroj en la jaro 2011*



Petrópolis, Brazilo


Carvalhos, Brazilo



Belém, Brazilo

Suellen Carvalho


Londrina, Brazilo

Paulo Araújo



Vivian R. Ferreira

São Paulo, Brazilo



Nathália Valério

Volta Redonda, Brazilo

***"Socian bilancon de LBV kontrolas Walter Heuer (sendependaj kontrolantoj), pro iniciato de José de Paiva Netto, direktoro-prezidanto de tiu Institucio, longan tempon antaŭ ol leĝo ekpostulis tiun faron."***

Legio de Bona Volo atingis en la jaro 2011 la signifan kvanton de 9.434.943 asistoj kaj bonfaroj al malriĉaj homoj, de nordo al sudo, oriento al okcidento, en Brazilo. La socian bilancon de LBV kontrolas Walter Heuer (sendependaj kontrolantoj), pro iniciato de José de Paiva Netto, direktoro-prezidanto de tiu Institucio, longan tempon antaŭ ol leĝo ekpostulis tiun faron.

La ĝenerala kresko de preskaŭ 11% kompare kun la jaro 2010 — en tiu jaro okazis pli ol 8,5 milionoj da asistoj kaj bonfaroj — montras, ke danke al helpo de multaj volontuloj kaj kunlaborantoj, pli da homoj ricevis apogon de la Institucio, kun aparta trajto: la principoj de Ekumena Spiritualeco, uzataj en ĉiuj socioedukaj agadoj. Tiu agado plibonigadas la vivon de miloj da familioj, kiuj ankoraŭ vivas en situacio de socia risko.

## Helpu al LBV

Respegule al la transformiĝoj, kiujn Brazilo trapasas, nur en prizorgado en hejmoj por maljunuloj, okazis plimultiĝo






Analice Barcelá

Campo Grande, Brazilo


Tatiane Silva

Salvador, Brazilo



Clayton Ferreira

Belo Horizonte, Brazilo

de 306%, kompare kun la laborkvanto okazinta en 2010. Sekve, pli granda kvanto da maljunuloj, aŭ forigitaj el familia grupo kaj/aŭ sen familiaj ligoj, povis regajni dignon kaj ekhavi pli aktivan kaj sanan vivon.

Kompare inter la jaroj 2010 kaj 2011, alia grava cifero signifas elvolviĝon de la agadoj de tiu Institucio: programo *Civitano-Bebo* — kiu prizorgas gravedulinojn kaj patrinojn kun malpli ol unujara ido — pligrandiĝis je 88%. Tiu agado kontribuas por sana gravedeco kaj familia bonfarto.

Misio de LBV estas *"promocii Edukadon kaj Klerecon kun Ekumena Spiritualeco, por ke estu Soci-media Konscio, Nutrado, Sekureco, Sano kaj Laboro por ĉiuj, je vekiĝo de la Planeda Civitano"*. Tial ni invitas vin partopreni en tiu teamo de Solidareco kaj helpi konstruadon de pli bona Brazilo kaj de pli feliĉa Homaro. Vizitu: www.legionofgoodwill.org


Leilla Tonin

Ponta Grossa, Brazilo

**RESUMO DE LA PROGRAMOJ — 2011**

| Programo | Asistoj kaj Bonfaroj |
|---|---|
| *Ŝirmejo — Hejmo por maljunuloj* | 266.202 |
| *LBV — Infano: Estonteco en Estanteco!* | 4.583.797 |
| *Profesikapabligo* | 141.487 |
| *Civitano-Bebo* | 24.967 |
| *Loko por Kunvivado* | 332.268 |
| *Reto Solidara Socio* | 1.354 |
| *Baza Edukado* | 3.854.864 |
| *SOS Katastrofoj* | 197.484 |
| *Aliaj asistoj** | 32.520 |
| **Sumo** | **9.434.943** |

*Sociaj labormobilizoj kaj kampanjoj (interalie disdonado de nutraĵokestoj, instrumaterialo).

# Alvoko por Rio+20

Izabella Teixeira





shutterstock.com

Diskonigo



Izabella Teixeira, ŝtatministro pri Naturmedio, estas biologiisto, diplomita en Universitato de Braziljo; magistro kaj doktoro pri Energi-Planado, en Federacia Universitato de Rio-de-Ĵanejro; kaj fakulo pri Rimedoj por Administrado de Naturmedio en regionoj de Strategia Naturmedia Taksado kaj Taksado pri Influo al Naturmedio kaj Agad-permeso en Naturmedio.

Brazilo ĉi-jare estos sidejo de Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Daŭripova Elvolviĝo, nome Rio+20. Ĝi estas la dudeka datreveno de Konferenco de UN pri Medio kaj Elvolviĝo, nome Rio-92, kiu postlasis konkretajn, gravajn heredaĵojn, kiel firmigon de modelo de daŭripova elvolviĝo, la tiel nomataj "Principoj el Rio", kaj la alprenon de novigaj dokumentoj, kiel konvencioj pri Ŝanĝo de Klimato, Biologia Diverseco kaj Kontraŭbatalo kontraŭ Dezertigo, krom Agendo 21.

Tamen, estas grave rekoni, ke ankoraŭ ekzistas mankoj inter tio, kion oni decidis en la jaro 1992 kaj tio, kion oni faradas, efektive, en la mondo, ĉirkaŭ la agendo pri daŭripova elvolviĝado. Tial, Rio+20 reprezentas unikan okazon ne nur por taksi la progreson atingitan, sed ankaŭ por kompreni la kialojn de ne plia antaŭenigo. Precipe estas esence grave, ke lecionoj de la pasinteco konduku nin al decidoj por alpreno de modeloj por daŭripova elvolviĝado, kiuj kongruas kun la esperoj pri ia mondo, kiun ni deziras por ni mem kaj por estontaj generacioj. La farenda decido ligiĝas al urĝeco en la nuntempo. Estonteco estas hodiaŭ, ja nun.

***Dudek jarojn post Rio-92, ni havas multe pli grandan diversecon de agantoj, kiuj profunde influas kaj estas influataj de la maniero kiel la mondo moviĝas.***


shutterstock.com

## Kreski, inkluzivi kaj protekti

La hodiaŭa mondo prezentas geografi-politikan desegnon tre malsaman ol tiu de la jaro 1992. Evoluantaj landoj kaj ekburĝonantaj ekonomipotencoj ludas novan rolon en solvado de tutmondaj problemoj. Rio+20 sukcesos nur se ĝiaj rezultoj ne produktos venkintojn aŭ malvenkintojn, sed landojn, kiuj vidas la bezonojn, prioritatajn celojn kaj kapablojn bone elpensitajn por decidoj cele al daŭripova elvolviĝo. La konferenco de UN estos sukcesa, se oni atingos kompromison kun aro da principoj, kiuj, pli ol konceptoj, faru, ke ĉiuj popoloj, en malsamaj etapoj de progreso, havu kondiĉojn por tutece trakti la agendojn ekonomian, socian kaj naturmedian. Estas nun tempo liveri novajn modelojn por elvolviĝo, kiuj konduku al daŭripova kresko, inkluzivado kaj protektado.

Kiam Brazilo decidis esti sidejo de Rio+20, ĝi havis klaran komprenon pri tio, ke la komplikeco de la sociaj, ekonomiaj kaj naturmediaj problemoj, kiujn la mondo alfrontas, postulas agojn pli ampleksajn, aŭdacajn kaj kongruajn kun multflanka sistemo. Forta mesaĝo de tiu procedo en la kunsido devas esti renovigita fido pri la multflanka sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kiel forumo por solvado de tutmondaj kaj regionaj problemoj.

En la geografi-politiko por elvolviĝado, necesas antaŭenpuŝi novigajn procedojn de dialogo kaj de kompromisoj. Tiuj procedoj tamen atingas longen trans la rolon de naciaj Ŝtatoj.

Rio+20 estos sukcesa, se ĉiuj landoj, institucioj kaj civitanoj esence ŝanĝos sian penson koncerne la manieron, kiel ni prizorgas la planedon. Ne plu temas pri elekto inter tiu aŭ alia ebleco, sed pri transformado en ion malsaman ol tio, kion ni travivas hodiaŭ. Dudek jarojn post Rio-92, ni havas multe pli grandan diversecon de agantoj, kiuj profunde influas kaj estas influataj de la maniero kiel la mondo moviĝas. La rolon de civila socio kaj de privata sektoro oni ne rajtas neglekti, male oni pligrandigos la breĉon ĉe aplikado de registaraj kaj interregistaraj decidoj pri daŭripova elvolviĝado. Rio+20 devas proponi novajn perspektivojn por efikaj ligoj inter tio, kion la civila socio faras, pensas kaj esperas, kaj tio, kion oni decidas je multflankaj procedoj kondukataj esence de registaroj.

## "La spirito de Rio"

Kompare kun la supera kunsido en la jaro 1992, la agendo de Rio+20 estas multe pli postulema. Ni ne aludas nur pri la diverseco kaj amplekseco de problemoj, kiujn kaŭzas la nuntempaj modeloj de elvolviĝado en agendoj socia, ekonomia kaj naturmedia. Ni ja aludas al urĝaj decidoj, kiuj konduku al novaj vojoj por elvolviĝo de landoj.

Rio+20 estas escepte taŭga okazo por ke oni reesprimu la karakteron nedisigeblan de la rilato inter ekonomia kresko, socia inkluzivado kaj racia uzado de naturmediaj rimedoj. Tiu estas la fundamento por solvo de nuntempaj problemoj.

Daŭripoveco estas la modelo por la estonteco de nia mondo. Alvenis momento por kompreni, ke daŭripoveco ne estas afero de idealismo, sed realaĵo. Alvenis la horo por ke ĉi tiu generacio donu la solan eblan respondon al krizoj: necesas ŝanĝi la nunajn kriteriojn por tutmonda elvolviĝo, per plenaj akceptado kaj administrado de naturmediaj limoj, poste malpliigo de malegaleco inter nacioj kaj inter popoloj. Sukceso de tia ŝanĝo postulos alvokadon al tutmondaj institucioj, registaroj, akademiaj sektoroj, sciencistoj, entreprenistoj, komunumoj, sociaj movadoj, neregistaraj organizoj kaj civitanoj, je tutlanda kaj loka sferoj.

Se oni devas kapti gravan lecionon el la lastaj dudek jaroj, tio estas, ke la signifoplenajn rezultojn atingitajn dum Rio-92 ne akompanis emo politika kaj de financaj rimedoj, de teknologio kaj de kompetenteco necesaj por ilia plenumado. Ni esence ne bezonas novajn kompromisojn, ni bezonas malsamajn manierojn kompreni kaj plenumi la jam prenitajn kompromisojn por daŭripova elvolviĝo.

Brazilo havas multe pli grandajn ambiciojn ol produktado de nova dokumento fine de la konferenco. Neforgesebla memoraĵo el Rio-92 estas tio, kion oni nomis "spirito de Rio". Kun tiu sama spirito ni devas labori en Rio+20. Kun tiu sama spirito ni devas antaŭeniri en kreskanta, inkluzivanta, protektanta Brazilo. Kun tia spirito ni devas agi de nun.




***Brazilo havas multe pli grandajn ambiciojn ol produktado de nova dokumento fine de la konferenco.***



# Kion esperi el Rio+20

José Goldemberg



shutterstock.com



Cecilia Bastos/Jornal USP

José Goldemberg estas fizikisto. Li estas brazila sciencisto, estis ministro pri Scienco kaj Teknologio (1990-1991), pri Edukado (1991-1992) kaj pri Naturmedio (1992), krom sekretario pri Naturmedio en la brazila subŝtato San-Paŭlo (2002-2006).

Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Medio kaj Elvolviĝo, nome Rio-92, kunvokis registarojn kaj organizojn de la civila socio en maniero eksterordinara: pli ol 100 ŝtatestroj partoprenis kaj ĉirkaŭ 100 mil homoj ĉeestis la eventojn, kiuj tiam plenumiĝis ĉirkaŭ ĝi.

Ĝin preparis karismoplenaj personecoj kiel **Maurice Strong**, ĝenerala sekretario de Supera Instanco de la Tero, kiel ankaŭ konatiĝis la renkontiĝo, kaj Rio-92 havis entuziasman apogon de la federacia registaro. Tiutempe, estis sento pri urĝeco pri bezono ekagi fronte al problemoj de la medio, kiuj minacis bonfarton de la Homaro, kiel plivarmiĝo de la Tero kaj sekvaj klimatŝanĝoj.

De tio rezultis, ke la konferenco alprenis gravajn dokumentojn kiel Konvencion pri Klimato kaj Konvencion pri Biologidiverseco, nome leĝaj rimedoj, kiuj fariĝis naciaj leĝoj, kiam ilin konfirmis propraj leĝdonaj organoj. Krome, oni adoptis Agendon 21, nome vojon sufiĉe detalan al **daŭripova elvolviĝo**. Ĉi tiu ŝlosila vorto envenis la vortostokon de ĉiuj homoj, de tiam, nome **daŭripoveco**, kiu signifas ekonomian kreskon en maniero, kiu ne damaĝas la estontecon.

***Daŭripova elvolviĝo — Brazilo havas bonegajn kondiĉojn por preni la unuan lokon en tiu procedo, kune kun Sudafriko, Ĉinujo kaj Hindujo.***

Post la Konferenco en Rio, en la jaro 1992, necesis kvin jaroj, ĝis 1997, por ke oni akceptu Protokolon de Kioto, kiu starigis celojn por malpliigo de eligado de gasoj, kiuj kaŭzas plivarmiĝon de la Tero kaj kalendaron por ĝia plenumado. Ĉi tiu interkonsento ekvalidis nur en la jaro 2005, tamen Usono restis ekster ĝi. Protokolon por enkonduko de Konvencio pri Biologidiverseco oni aprobis en la urbo Nagojo, en la jaro 2009.

Sekve, progresoj atingitaj ekde 1992 estis modestaj, kio ne signifas, ke oni faris nenion. Landoj de Eŭropa Unio relative bone plenumis siajn kompromisojn. Multaj municipoj kaj eĉ ŝtatoj en federaciaj landoj sekvis la rekomendojn de Agendo 21; iuj alprenis celojn por malpliigo de eligado de gasoj, kiuj kaŭzas dampan efikon, kiel subŝtato Kalifornio, en Usono, kaj San-Paŭlo, en Brazilo.




## Kio estas esperiga

Rio+20 celas fari ĝeneralan kalkulon pri tio, kion oni sukcesis efektivigi dum la lastaj 20 jaroj favore al daŭripova elvolviĝo, kaj eventuale proponi novajn vojojn kaj agadojn. La perspektivoj por sukceso en la konferenco estas ankoraŭ necertaj kaj pli da klopodoj necesas por eviti, ke ĝi transformiĝu nur al podio por politike ĝustaj kaj retorikaj deklaroj pri la medio.

Fare de Unuiĝintaj Nacioj, en januaro 2012, prepariĝis dokumento, kiun oni devos diskuti kaj probable akcepti en landoj en junio. La teksto havas la esprimoplenan titolon "La estonteco, kiun ni deziras", kun 128 alineoj, plej ofte nur kun admonoj al ŝtatojmembroj de UN, ke ili realigu pli da aferoj por daŭripova elvolviĝado, tamen ĝi ne skizas agadplanojn por konkretigi tiajn proponojn. La vortoj "reaserti", "rekoni", "kuraĝigi" kaj "pledi" aperas en 118 el 128 alineoj. Tamen, ĉeestas iuj promesplenaj artikoloj, interalie:

- Aliigi Programon de Unuiĝintaj Nacioj pri Medio (UNEP, angle) al agentejo de UN, same kiel Monda Organizo pri Sano aŭ Monda Organizo pri Komerco, kio donus al ĝi pli da povo kaj financaj rimedoj;
- Krei ĝis la jaro 2015, kalkulojn

por mezurado de atingitaj progresoj. Ekzistas proponoj krei kalkulon pri elvolviĝo, kiu konsideras, krom GDP (anglalingvaj komencliteroj: Gross Domestic Product — MEP, Malneta Enlanda Produkto), ankaŭ la kostojn ĉe la naturmedio, se oni faras elvolvadon medidamaĝan;

• Akcepti transiron al ia "verda ekonomio" kiel tutmondan, ampleksan celon, kiu konduku nin al ia "ekonomio kun malmulte da karbono". Verdan ekonomion oni devas kompreni kiel strategion, kiu protektu la naturan fundamenton de disponeblaj rimedoj kaj kontribuu al forigo de malriĉeco.

Tiu dokumento faras proponojn ankaŭ en la kampo de energio, kio ne okazis en Agendo 21. Ĝi apogas la proponon de la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, **Ban Ki-moon,** nome duobligi ĝis la jaro 2030 la efikecon, per kiu oni uzas energion, kaj plej grave, duobligi en la sama tempodaŭro, la parton de renovigebla energio en tutmonda energifonto. Rekono pri la graveco de energio kiel esenca elemento por daŭripova elvolviĝo signifas nur rekonon pri realaĵo. Tamen, landoj produktantaj petrolon siatempe voĉdonis kontraŭ ĝia inkluzivigo en la decidojn de Rio-92. Bedaŭrinde, 2030 estas en fora estonteco. Eĉ la Durbana Konferenco (COP-17, en la jaro 2011) estis pli aŭdaca, kiam ĝi decidis, ke ĝis la jaro 2020 devos ekvalidi nova internacia interkonsento, kiu anstataŭu la Protokolon de Kioto kaj fiksu neprajn kompromisojn flanke de ĉiuj landoj, inkluzive de Ĉinujo, por malpliigo de gasoj kaŭzantaj dampan efikon.

Konklude, kiu devos fari konkretajn agadojn cele al daŭripova elvolviĝo estas ŝtatoj-membroj aŭ ŝtat-blokoj, kiel faris Eŭropa Unio koncerne eligadon de gasoj mondvarmigaj. Pro tio, Brazilo havas bonegajn kondiĉojn por preni la unuan lokon en tiu procedo, kune kun Sudafriko, Ĉinujo kaj Hindujo, per modelo de programoj jam sukcese aplikataj, kie *Lumo por Ĉiuj,* aŭ produktado de etanolo el sukerkano. Aliaj landoj havas bonegajn programojn pri ventoenergio, kiel Hispanujo, Danlando kaj eĉ Usono.

***Hodiaŭaj problemoj, kiujn la Homaro alfrontas estas seriozaj kaj efektive minacas estontajn generaciojn.***

Hodiaŭaj problemoj, kiujn la Homaro alfrontas estas seriozaj kaj efektive minacas estontajn generaciojn. Damaĝa ekspluatado de naturaj rimedoj kondukas al elĉerpiĝo de fosiliaj bruligaĵoj kaj de biologidiverseco de ekologisistemoj esence gravaj por plua produktado de nutraĵoj. La eŭforio, kiun kaŭzis eltrovo de petrolo en subsala tavolo, en Brazilo, ne ŝanĝas la fakton, ke mondaj rezervoj de tiu energiriĉaĵo, apud la natura gaso kaj karbo, certe ne daŭros multajn jarojn, kaj ke ĝia uzado estas la ĉefa fonto de urba medimalpurigo kaj ankaŭ de tutmonda medimalpurigo, kiun oni alfrontas.

Estas do erara la ideo, ke zorgemo pri mediprotektado estas baro al ekonomia elvolviĝo. Tian ideon oni devas alĝustigi. Rio+20 proponas oportunan okazon por tion fari.



# La destino de la Homaro

Fabio Feldmann

shutterstock.com





Fabio Feldmann, konsilanto pri temoj rilataj al naturmedio kaj daŭripoveco. Li partoprenas en seminarioj kaj konferencoj pri tiuj temoj en Brazilo kaj eksterlande. Li diplomiĝis pri Juro en Universitato de San-Paŭlo (USP) kaj pri Administrado de Entreprenoj en Fondaĵo Getúlio Vargas (FGV), li estis federacia deputito elektita por tri periodoj, inter 1987 kaj 1998.

Por kompreni Rio+20 necesas retroiri en la tempo kaj kompreni la motivojn por Rio-92: kio faris, ke Unuiĝintaj Nacioj okazigu tiun grandan konferencon, la plej grandan iam faritan de ĝi, kun amasa ĉeesto de ŝtatestroj kaj granda alvokado al amaskomunikiloj kaj al la civila socio.

La unua granda konferenco okazis en Stokholmo, Svedujo, en la jaro 1972, kaj havis kiel temon "La Homo kaj la Biosfero". En ĝi oni havis malgrandan partoprenon de tio, kion ni nuntempe konsideras kiel civilan socion kaj nur unu ŝtatestro ĉeestis, nome la ĉefministrino de Hindujo, **Indira Gandhi** (1917-1984), kiu tie okupis la unuan lokon en la sinteno, ke evolulandoj havu kiel prioritaton ĉiam ekonomian kreskadon por kontraŭbatali malriĉecon. Zorgemo pri la planedo kaj pri naturmedio estas laŭ ŝi ia komploto por bari elvolviĝon de tiuj landoj. Brazilo estis unu el la grandaj protagonistoj, kiuj kunigis sian voĉon al tiu de Hindujo...

Iamaniere, oni rajtas aserti, ke nur meze de la jardeko post 1980 la afero pri naturmedio atingis elstarecon, post konstato pri truo en la ozontavolo super Antarkto, kio fariĝis senduba pruvo, ke la Homaro komencis frapi la naturmedion per neniam vidita forto.

Unuiĝintaj Nacioj siavice kreis Mondan Komisionon pri Naturmedio kaj Elvolviĝado, kiun oni konas ankaŭ kiel Komisionon Brundtland, en la jaro 1983, por analizi la situacion de la mondo ekde la jaro 1972. Kaj de tio rezultis raporto *Nia Komuna Estonteco* (Our Common Future), publikigita en 1987, kaj ĝi taŭgis kiel platformo por alvoko al la dua granda konferenco, pro la skuo al la publika opinio koncerne la jam menciitan truon en la ozontavolo. La renkontiĝo pruntprenis la titolon de la Komisiono, kaj nomiĝis "Monda Konferenco pri Naturmedio kaj Elvolviĝado".

Okazis longa preparperiodo kaj gravajn formalajn produktojn oni atingis: Deklaro el Rio, Agendo 21, Konvencio-Kadro de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimataj Ŝanĝoj kaj Konvencio pri Biologia Diverseco. Ĉi tiuj du lastaj estas internaciaj traktaĵoj, kiuj rezultigas devojn al subskribintaj landoj, dum la ceteraj klasiĝas kiel *soft law*, tio estas, sen estigo de leĝaj devoj. Krome, la konferenco kreis Komisionon por

***(...) Jam komencis nomi ĉi tiun tempoperiodon, kiun ni nun trapasas, kiel "Antropocenon". Ia nova erao, en kiu la Homaro havigis al si geologian forton fronte al la Naturo, kio kaŭzas gravajn rezultojn.***



Fotoj: UN Photo/Yutaka Nagata

# 1972

Dum la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri la Homa Medio, en Stokholmo, Svedujo, la tiama ĉefministrino de Hindujo, Indira Gandhi, gvidis la sintenon de evoluantaj landoj defende de ekonomia kresko kiel prioritato por kontraŭbatali malriĉecon.

Daŭripova Elvolviĝo, en la kadro de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok), kun la celo stimuli diskutadon pri tiu temo kaj pri Agendo 21.

Dum la lastaj dudek jaroj, ni vidis radikalajn transformiĝojn en la mondo, ekzemple revolucion en teknologio pri informado per interreto kaj poŝtelefono, krom elstariĝo de landoj kiel Ĉinujo, Hindujo kaj Brazilo. Koncerne la planedon, progresoj en scienco montras pli kaj pli, ke la Homaro troviĝas fronte al iuj limoj.

La modelon pri tiuj limoj priskribis, per studaĵo publikigita en la revuo *Nature*, grupo da sciencistoj sub la gvido de **Joham Rockström**, kaj ĝi indikas naŭ tutplanedajn limojn — klimatŝanĝo, kvanto da perdo de biologidiverseco, ciklo de nitrogeno kaj ciklo de fosforo, detruado de la stratosfera ozontavolo, acidigo de oceanoj, tutmonda uzado de sensala akvo, ŝanĝoj en la uzado de grundo, koncentriĝo de atmosfera aerosolo kaj ĥemia malpurigado de la naturmedio.

Iuj homoj jam komencis nomi ĉi tiun tempoperiodon, kiun ni nun trapasas, kiel "Antropocenon". Ia nova erao, en kiu la Homaro havigis al si geologian forton fronte al la Naturo, kio kaŭzas gravajn rezultojn. Inter ĉi tiuj, oni substreku la gravecon de klimataj ŝanĝoj

pro monda plivarmiĝo, kio postulas radikalajn decidojn, se oni volas stabiligi la pligrandigon de la temperaturo de nia planedo ĝis la fino de la nuna jarcento je 2°C.

Por tio, necesas fari transiron, dum la proksimaj dudek, ĝis kvindek jaroj, al ekonomio kun malalta uzado de karbono, cele al evitado de tragikaj konsekvencoj, nome sekaj periodoj, inundoj kaj varmondoj, kiuj atingos nin ĉiujn. Kaj la landaj ekonomioj siavice vere renversiĝos sur siajn kapojn.

## Kio povas malvigligi la diskuton

En la kalendaro de ĉi tiu jardeko principe ne ekzistas evento pli oportuna por ke oni alfrontu la defiojn de la Homaro ol Rio+20, kondiĉe ke ĉeestu kuraĝo por esprimi senton pri urĝo rilate la momenton, kiun ni travivas. Sed bedaŭrinde ni malŝparas ĉi tiun okazon pro manko de koncentriĝo je okazantaj diskutoj kaj pro la foresto de gvidanto inter landoj, enfermitaj en malvasta kompreno je nelonga tempo, kaj pri la tiel nomataj naciaj interesoj, kiuj influas diplomatiajn diskutojn.

Plej granda rezulto ĝis nun de tio, kion ni diras, estas la baza dokumento el la konferenco, la tiel nomata *La estonteco, kiun ni deziras* (The Future We Want): ĝi klopodas ĉion inkludi, tamen ĝi maltrafas la kapablon starigi prioritatojn kaj riskas ripeti la erarojn de la Konferenco Rio+10, en Johannesburg (Sudafriko). Tiu produktis Planon por Enkondukado, kiu tute ne plenumiĝis.

Eĉ pli gravaj estas la malfacileco institucie respondi al la defioj, kaj jen ni devas fari historian klarigon. En la jaro 1972, oni kreis Programon de Unuiĝintaj Nacioj pri Medio (UNEP, angle), kies sidejo troviĝas en Najrobo, en Kenjo. En la jaro 1992, kiam oni subskribis la jam menciitajn konvenciojn, oni kreis burokrataĵojn por ĉiu el ili, sen la zorgemo almeti la necesan sinergion inter ili, kaj ankaŭ inter la ceteraj multflankaj akordoj pri naturmedio, kiuj nuntempe estas centoj. Tio estas, necesas fari grandan klopodon kaj kuraĝo por kontentigi tiun institucian bezonon.

La destino de la Homaro trapasas tra Rio+20 kaj sekve la destinon de ĉiu el ni. Brazilo neniam havis antaŭ si tiel brilan momenton por sinteni kiel gvidanto favore al moderna kaj vasta rigardo al agendo, kiu celas daŭripovecon. Sufiĉas forta volo.

**2002**

Konferenco Rio+10, en Johannesburg, Sudafriko, ankoraŭ ne realigis sian Planon por Enkondukado.



UN Photo/Eskinder Debebe



shutterstock.com

# Nuntempaj kaj estontecaj amazoniaj defioj

Adalberto Luis Val kaj
José Alberto da Costa Machado

Diskonigo



Adalberto Luis Val, doktoro pri Biologio de Sensala Akvo kaj Internlanda Fiŝkaptado kaj nuntempa direktoro de Nacia Instituto de Esploroj en Amazonio (INPA), studas adaptiĝojn al akva medio en Amazonio. Li estas stipendiulo pri produktado 1-a de CNPq. Li partoprenas studojn pri kaŭzoj kaj konsekvencoj de regionaj malekvilibroj en Scienco, Teknologio kaj Edukado. Li estas aktiva membro de Brazila Akademio de Sciencoj kaj de la estraro de Brazila Societo por Progreso en Scienco (SBPC).

Daniel Nava




José Alberto da Costa Machado, doktoro pri Socimedia Elvolviĝo, magistro pri Komputoscienco, eminenta ekonomikisto, entrepreno-administranto, asocia profesoro de Departemento de Ekonomiko de Federacia Universitato de Amazono kaj kunordiganto de Esplorado pri Socio, Medio kaj Esploroj de Nacia Instituto de Esploroj en Amazonio (INPA).

Ekde la fama raporto de Klubo de Romo pri naturmediaj limoj por ekonomia kreskado[*1], la Homaro serĉadas vojojn por solvi la nekongruecon de sia vivmaniero kun la eltenkapablo de la planedo. Post la komenca marko ĉe Konferenco de Stokholmo, en 1972, la Sistemo de UN de tempo al tempo renovigas sian diskutagendon, ĉirkaŭ kognaj kliŝoj, kiuj kaptas la atenton kaj revivigas la riskojn de civilizaj sensolvaj situacioj kaŭzataj de nia modelo de progresado. Tiam, sekvis *ekologia elvolviĝo*, *daŭripova elvolviĝo*, *Agendo 21* kaj aliaj; plej ĵuse, *verda ekonomio*. Sub ĉi tiu, Konferenco Rio+20 klopodas kunigi naturmedian daŭripovecon kun forigo de malriĉeco, kiel premisoj de ia ekonomio, kiu baziĝas sur dinamika produktado kun malalta eligado de karbono kaj efika uzado de rimedoj, kaj kompromisiĝu pri socia inkluzivigo, aparte de tiuj homoj sen minimuma digna vivo.

Kompreneble, Amazonio estos temo por diskuto pro sia *tutmonda ekologia graveco*, pro sia kondiĉo kiel loko de *naciaj strategiaj interesoj* kaj ankaŭ pro sia situacio en kampo de *regionaj produkto-dinamikoj*, preskaŭ ĉiam kun gravaj efikoj sur la loka vivularo. Tamen, tiaj diskutoj devas superi konsiderojn, kiuj alternigas radikalecon je konservado, laŭ kiu ĉio estas malpermesata, kaj la volupton je *alproprigemo*, laŭ kiu ĉio estas permesata. Cetere, temas pri regiono, kies brazila parto respondas al 61,2% el la tutlanda teritorio kaj kie vivas 21 milionoj da homoj, en naŭ subŝtatoj[*2] kaj pli ol 600 municipoj, kun dekoj da miloj da vilaĝoj kaj komunumoj, krom 135 indianaj grupoj, kun soci-ekonomiaj datumoj, kiuj montras urĝajn bezonojn.

Laŭlonge de la Historio, tiu regiono estas daŭre scenejo de ekonomiaj procedoj, kiuj lasis en ĝi naturmediajn ŝanĝojn, socian malstrukturiĝon kaj ekonomian malriĉecon. Tiel okazis rilate la ciklojn de kamparaj drogoj[*3], de kaŭĉuko, de grandaj agrikulturaj kaj mineralmetalurgiaj projektoj, kaj aliaj.



[*1] MEADOWS, Donella H.; MEADOWS, Dennis L.; RANDERS, Jorgen; BEHRENS III, William W. (1972). *Limoj al kreskado: raporto por Projekto de Klubo de Romo pri la dilemo de la homaro*. San-Paŭlo: Eldonejo Perspectiva.

[*2] Laŭleĝa Amazonio enhavas naŭ brazilajn subŝtatojn: Acre, Amapá, Amazonas, Mato Grosso, Pará, Rondônia, Roraima, Tocantins kaj Maranhão — ĉi tiu lasta nur parte, okcidente de meridiano 44° WGr. Ili kune etendiĝas en areo de 5.217.423 kvadrataj kilometroj.



Persona arkivo de Washington Novaes

*Laŭlonge de la Historio, tiu regiono estas daŭre scenejo de ekonomiaj procedoj, kiuj lasis en ĝi naturmediajn ŝanĝojn, socian malstrukturiĝon kaj ekonomian malriĉecon.*

Nuntempe, flanke de nova ondo da hidro-elektraj projektoj kaj de grandaj en- kaj interregionaj ŝoseoj, firmiĝas egale novaj kaj grandaj projektoj por minerala ekspluatado, kiel petrolo, naturgaso kaj metalaj mineraloj. Tiuj iniciatoj havas kiel komunan trajton la ekspluatan karakteron, malmultan aŭ nenian aldonon de valoro al la regiono, malaltan influon en la regionan mongajnon kaj kutimajn naturmediajn efikojn kaj socian malstrukturadon.

Iom post iom, la inteligentularo el tiuregiona scienca medio ŝajne ekkonscias pri la urĝa bezono ŝanĝi la scenejon. Disvastiĝas en tiu regiono novaj universitatoj; firmiĝas en la subŝtatoj fondusoj kaj fondaĵoj por apogo al esplorado kaj renovigado; strukturiĝas programoj de magistriĝo kaj doktoriĝo kaj centoj da kursoj por fakiĝo. Krome, institutoj de esplorado komencas alpreni agendojn pli ligitajn al regionaj produktadobezonoj, kapablaj produkti ekonomiajn riĉaĵojn, sed kongruajn kun la bezonoj de uzado kaj konservado de la malsimplaj, delikataj ekologiaj sistemoj de tiu regiono, same kiel kun plibonigo de la vivo de la tieaj loĝantoj.

## Scienca kono por nova ekonomio

Kaj jen estas espero pri nova estonteco por Amazonio. Regionaj institucioj por edukado kaj esplorado havas ampleksan sperton pri formado kaj fiksado de homaj rimedoj altnivele kvalifikitaj kaj produktas multe da scienca kaj teknologia kono pri la regionaj ekologiaj sistemoj. Tiu estas kapitalo mobilizebla por enkonduki novan ekonomian fundamenton, kiu apogiĝu sur transformado de tiuj intelektaj amasoj en faktorojn de produktado kaj okazoj por novaj negocoj. La temoj, kiuj kandidatiĝas al tiaj iniciatoj inkluzivas biologi-diversecon kaj servojn rilatajn al ekologiaj sistemoj, produktadon surbaze de agrokultura-arbara-paŝtada kaj akvokultura fundamento, arbara kaj akva manipulado, ekstraktado de vegetaĵoj kaj bestaĵoj kaj aliaj produktoprocedoj surbaze de naturaj rimedoj en Amazonio.

Tamen, tiuj institucioj bezonas plifortiĝon rilate homajn kaj administrajn rimedojn, rilate regulan kaj sufiĉan disponigon de financaj rimedoj, kaj klarvidan rolon rilate publikajn politikojn, kiuj pritraktas regionan elvolviĝadon. Cetere, la demandon pri homaj rimedoj en Amazonio oni devas repensi, ekde la baza lernejo, en kiu oni daŭre tenas homogenan edukadon, kiu fine delokas infanojn de ilia medio kaj de ilia kulturo. Je supera nivelo, per-

[3] "Kamparaj drogoj" estis la alnomo uzata por produktoj kiel vanilo, kakao, kariofilo, gvarano, ipeko kaj bikso.




## LAŬLEĜA AMAZONIO

**61,2%** el la tutlanda teritorio

**21 milionoj** da homoj, dise en naŭ subŝtatoj

**Pli ol 600 municipoj** kun dekoj da miloj da vilaĝoj kaj komunumoj

**135** indianaj grupoj

**4%** el la postdiplomiĝaj programoj en nia lando funkcias en amazoniaj institucioj, plej ofte klasigitaj kiel komencaj en skalo de taksado de Kunordigo de Trejnado de Homoj en Supera Nivelo (Capes).

**Iom pli ol 4,2 mil** doktoroj en la kadroj de ĉiuj institucioj por edukado kaj esploroj en naŭ amazoniaj subŝtatoj.

*Fonto: INPA*

sistas problemoj pri kvalito kaj grada evoluo. Iom pli ol 4% el la programoj de postdiplomiĝa kurso funkcias en amazoniaj institucioj, plej ofte klasitaj kiel komencaj en la klasifiko de Kunordigo de Trejnado de Homoj en Supera Nivelo (Capes). Krome, forestas programoj por formado de magistroj kaj doktoroj pri kampoj absolute esencaj en tiu regiono, malgraŭ grandega klopodo de Capes kaj de la Nacia Konsilantaro por Scienca kaj Teknologia Elvolviĝo (CNPq). Oni kalkulas, ke estas iom pli ol 4,2 mil doktoroj en la kadroj de ĉiuj edukaj kaj priesploraj institucioj en naŭ amazoniaj subŝtatoj, kio kaŭzas tre malfortan situacion por la bezonoj de tiu regiono, aparte en ĉi tiu momento, kiam oni serĉas alternativojn por tio, kion oni nomas "verda ekonomio".

En Amazonio, kuniĝas kondiĉoj favoraj al efektiva eksperimentado pri la ideoj pri verda ekonomio, laŭ tio, kio prezentiĝas en Rio+20: riĉa, grandega kaj grava biologia sistemo, ankoraŭ grandparte konservita; regiona loĝantaro, kiu bezonas pliampleksigon de sia mongajno, socian inkluziviĝon kaj plibonigon de vivkvalito; solidan aperon de regiona sistemo de scienco, teknologio kaj renovigado surbaze de universitataj kaj poresploraj institucioj; tekniko-sciencan eliton engaĝitan en serĉado de novaj modeloj por elvolviĝado por tiu regiono; kaj ŝajne interesan strategian intereson flanke de la federacia registaro, pro la atentado de tutmonda komunumo.

Espereble la efiko de tiu nova motiviga alvoko alportita de Rio+20 — *verda ekonomio* — fariĝos renoviga mejloŝtono por Amazonio! Per tio, la regiono superu sian kondiĉon de tutmonde grava spaco, strategian laŭ tutlanda konsidero, sed kun malriĉa, suferanta popolo kaj kun naturmedio konstante ekspluatata, kun malmulta aŭ nenia bonfarado por sia loĝantaro.





# Sekura
## akvo por ĉiuj

Marco Antonio Palermo

shutterstock.com

Daniel Trevisan



Marco Antonio Palermo estas doktoro pri Inĝenierarto de Akvorimedoj kaj magistro pri Inĝenierarto de Akvo kaj Media Higieno, en Politeknika Lernejo de USP; inĝeniero faka pri hidrologio, pere de International Institute for Hydraulic and Environmental Engineering, Delft, Nederlando; kaj konsultanto en publikaj kaj privataj institucioj kiel ANA (Naciaj Agentejo pri Akvoj), LBV (Legio de Bona Volo), OEA (Organizo de Amerikaj Ŝtatoj). Li estas prezidanto de Instituto por la Naturmedio (IPA) kaj de entrepreno Altamisa Engenharia e Comércio Ltda.

Oni kalkulas, ke Brazilo enhavas 12% el la rezervoj de sensala akvo disponebla en la mondo. Tamen, tiuj rimedoj estas neregule trovataj, nome 70% koncentriĝas en la Amazonia baseno, kiu enhavas 63% el la nacia teritorio, sed enhavas nur 5% el la tutlanda loĝantaro. La duondezerta Nordorienta Regiono, inkluzive de plej granda parto de akvobaseno de rivero San-Francisko, kiu respondas al 8% el la tutbrazila teritorio kaj 35% el la tutlanda loĝantaro, disponas pri nur 4% el la disponeblaj akvorimedoj.

En la Suda kaj Sudorienta regionoj, kie koncentriĝas 60% el la brazila loĝantaro, troviĝas grandaj urbocentroj. Tie okazis vigla industria elvolviĝo, ekde la mezaj jaroj en la jardeko post 1930, kiu kaŭzis laŭ la tempopasado malabundon de akvorimedoj kaj gravajn konfliktojn pro uzado de akvo.

Serĉado de garantio pri sekura akvo, koncerne kvanton kaj kvaliton, estis daŭra celo en la brazila socio, laŭlonge de jardekoj post 1940-1970. Dum tiu tempo, Brazilo transformiĝis: ĝi estiĝis ne plu kampara lando sed lando, kie plej granda parto de la loĝantaro vivas en urboj.

Produktado kaj disdonado de elektroenergio kaj publika liverado estis la ĉefaj punktoj de publika administrado ĝis la fino de jaroj post 1970. Laŭlonge de kelkaj jardekoj oni starigis novajn instituciajn meĥanismojn por administrado de sektoroj de elektroenergio kaj higieno, kio liveris nemalhaveblan evoluon en konservado de vivkvalito kongrua kun elvolviĝonivelo, kiu levis Brazilon al kondiĉo de unu el la plej grandaj ekonomiaj potencoj en la mondo.

Dum la jaroj post 1980, Brazilo trapasis tempon de politika kaj institucia reformulado. La sektoro de akvorimedoj atingis gravajn punktojn, pro la enkonduko — en la novan Federacian Konstitucion kaj en la konstitucion de subŝtatoj — de principoj kiel integra administrado de akvorimedoj kaj de administradaj meĥanismoj.

Ni atingis la fruajn jarojn post 1990 kun novaj plurdisciplinaj regulaj manieroj por administrado de akvorimedoj. La integra administrado antaŭvidis intervenon en la riveraj basenoj, en maniero malcentra kaj partoprena. Laŭ ĝi, uzantoj kaj registaraj institucioj, en divida maniero, komencis formuli politikojn por uzado de akvorimedoj, laŭ celoj de planoj pri riverbasenoj aprobitaj fare de studgrupoj nomataj Komitatoj pri Riverbasenoj kaj Konsilantaroj pri Akvorimedoj.

***La konferenco Rio+20 de UN estas ideala okazo por starigi ĝeneralan analizon flanke de ĉiuj, serĉe de plibonigo de la medio, aparte koncerne akvorimedojn.***

**70%**
***el la rezervejoj de sensala akvo en Brazilo koncentriĝas en la Amazonia baseno, kiu respondas al***
**63%**
***el la nacia teritorio, kie ĉeestas nur***
**5%**
***el la brazila loĝantaro.***



shutterstock.com

Agendo 21, la ĉefa rezulto de Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Medio kaj Elvolviĝo (Eco-92), konfirmis la bezonon pri reformo en akvoadministrado. En ĉapitro 18-a de tiu dokumento oni povas legi: *"(...) Tuteca prizorgado pri sensala akvo kiel rimedo limigita kaj damaĝebla kaj integrado inter planoj kaj sektoraj programoj pri akvo kaj ekonomiaj, sociaj, naciaj planoj, estas esence gravaj paŝoj por la jardeko post 1990 kaj la estonteco".* En tiu sama ĉapitro, troviĝas ankoraŭ: *"Integra prizorgado de akvorimedoj baziĝas sur percepto pri akvo kiel integra parto de la ekosistemo, natura rimedo kaj sociekonomia valoraĵo, kies kvanto kaj kvalito determinas la manieron uzi ĝin".*

Okaze de Eco-92, Brazilo sin prezentis avangarde koncerne akvoadministradon. Ĝia modelo de administrado, jam pripensita kaj en komenca fazo de starigo, montriĝis perfekte kongrua kun la principoj produktitaj en la konferenco. Unu el la rezultoj de tiu pozicio estis la bonega atingo fare de nia lando en kaptado de rimedoj el pli evoluintaj landoj por mediplibonigo de regionoj tre malpuraj, kiel tiu de rivero Tietê kaj golfeto Guanabara, responde en subŝtatoj San-Paŭlo kaj Rio-de-Ĵanejro; ili estas projektoj, kiuj evoluas ĝis la nuna tempo.

Post la konferenco, nia lando plu agis por plibonigi manierojn por akvoadministrado. "Leĝo pri Akvoj" (Leĝo 9.433/97) alprenis ĝeneralajn principojn rekomenditajn per diversaj dokumentoj, kiuj resumas internacian sperton por administrado de akvorimedoj, kaj kreas bazajn vojojn por ĝia efektiva praktikado.

Sekve, per la kreo de Nacia Agentejo pri Akvoj (ANA), en la jaro 2000, oni faris gravan paŝon: enkonduko, fare de federacia kaj ŝtataj registaroj, de projektoj por realigi modelon de ***sekura akvo por ĉiuj***, precipe per ekvilibro inter investoj je infrastrukturo kaj agadoj por stimulado de elvolviĝo aŭ firmigo de leĝa kaj institucia markoj por administrado kaj efika uzado de akvorimedoj.

La konferenco Rio+20 de UN estas ideala okazo por starigi ĝeneralan analizon flanke de ĉiuj, serĉe de plibonigo de la medio, aparte koncerne akvorimedojn. Nia historio pri evoluado estas daŭra kaj efika laŭlonge de la lastaj 20 jaroj.

Estas rimarkinda la socia konsciiĝo pri bezono agi pli kaj pli integre rilate median administradon. Nuntempe, ni ne diskutas nur pri sekureco de akvo, sed egale pri media sekureco entute. Problemoj kiel tiuj pri urbaj akvoj kaj internaciaj akvoj jam ne limiĝas al rondo de fakuloj, sed pli kaj pli koncernas la socion.

Sufiĉe da akvo, laŭkvante kaj laŭkvalite, por ĉiuj homoj, nepre ligiĝu al medioprotektado de akvofontoj, kontrolo kaj prizorgado de elfluejoj, ĝusta dismetado kaj prizorgado de solidaj rubaĵoj kaj efika urba elpurigado.

La estonteco de firmigo de administraj principoj pri akvorimedoj postulas pli kaj pli da kunlaborado inter homoj, institucioj kaj landoj. Tia speco de kunlaborado, kun grandegaj defioj kaj bezono pri konstantaj progresoj, devas plu strikte okazadi, en progresado al solvoj de problemoj, kiuj minacas la naturmedion.

# Sano kaj naturmedio

***Gravaj konsekvencoj de medimalpurigado kaj de klimataj ŝanĝoj je la homa korpo***



shutterstock.com

Rilato inter naturmedio kaj vivkvalito en la loĝantaro estas ĉeftemo de intervjuo donita de la kuracisto **Paulo Saldiva**, kunordiganto de Laboratorio pri Atmosfera Malpuriĝo de Universitato de San-Paŭlo (USP), al BONA VOLO. Laŭ li, oni facile perceptas influon de mediaj faktoroj — fizikaj, biologiaj kaj ĥemiaj — je la homa sano, de la rezulto de tempo, kiun oni forperdas en trafikŝtopiĝoj ĝis serio da malsanoj, kiuj povas okazi pro ĉiutagaj situacioj en giganturboj, kiel bruado, aermalpuriĝo kaj eĉ malsanoj kaŭzataj de klimataj ŝanĝoj.

Tiu kuracisto komentis la gravajn paŝojn de "Rekomenda Dokumento pri Sano, San-Paŭlo, C40 2011"*, kiun preparis Fakultato de Medicino de Universitato de San-Paŭlo, rezulte de kunlaboro

## Bonaj iniciatoj koncerne transportoveturilojn

Fotoj: Diskonigo



Nov-Delhio (Hindujo)



Londono (Britio)

Datumoj el urboj Londono (Britio) kaj Nov-Delhio (Hindujo) indikas malpliigon de homkorpa senaktiveco kaj de loka koncentriĝo de medimalpuraĵoj post stimulado al aktiva sinmovado, nome per biciklo kaj piedirado, kaj post alpreno de motoroj kun malalta eligado de karbono (Woodcock, 2009). En la brita ĉefurbo, oni kalkulas malpliigon de la okazado de kormalsanoj kaj de cerba iskemio, inter 10% kaj 20%, mamkancero inter 12% kaj 13%, de demenco je 8% kaj de depresio je 5%. En la hinda ĉefurbo, antaŭkalkuloj indikas malpliiĝon inter 11% kaj 25% de registroj de kormalsanoj kaj cerbomalsanoj kaj inter 6% kaj 17% en elspezoj pro diabeto.

**Stimulado al korpaktiveco** — En pluraj lokoj en la mondo, uzado de bicikloj malpliigas homkorpan senaktivecon kaj lokan koncentriĝon de medimalpuraĵoj. Bonajn ekzemplojn de tia sinteno, kiu koncernas sanon kaj medion, oni povas trovi en (1) Nov-Delhio kaj (2) Londono. Ĉi tiu lasta prezentas ankaŭ efikajn metroajn liniojn, nome publikan transportilon kun pli pura fonto de energio.

(Fonto: "Rekomenda Dokumento pri Sano, San-Paŭlo, C40 2011".)

inter la Loka Administra Komitato de C40, la Kunordiga Instanco de Kvadrato Sano/Juro de USP kaj Instituto Sano kaj Daŭripoveco.

Per tiu dokumento, sciencistoj montras, ke multaj agoj por batalo kontraŭ tutmonda plivarmiĝo rezultigas tujajn bonfarojn por la homa sano. Tiu dokumento prezentas ankaŭ alarmajn ciferojn koncerne la San-Paŭlan ĉefurbon, kiujn oni povas transmeti al diversaj urboj en la mondo, kiu alfrontas seriozajn problemojn pro senorda progreso. Laŭ la esploro de d-ro Saldiva, en la jaro 2010 oni atingis maltrankviligan kalkulon: *"La niveloj de medimalpurigo en San-Paŭlo kaŭzas proksimume 4 mil antaŭtempajn mortojn jare kaj malpliigon de 1,5 vivojaro (...), kun financa kosto kiu, depende de la mezurmaniero, povas varii inter centoj da milionoj ĝis pli ol unu miliardo da dolaroj jare (...)"*.

Por zorgi pri tia malfortika sanstato, tiu kuracisto kaj esploristo receptas investojn je urboplanado, publikaj transportiloj kaj baza medihigieno, kio postulas de aŭtoritatuloj integrajn paŝojn inter ministerioj kaj sekretariejoj. *"Mankas iomete kreo de socio protektanta homon. Tiu homo, kiu vivas en urboĉirkaŭaĵoj, kiu devas vekiĝi frue por labori, kiu amasiĝas en netaŭga kolektiva transportilo, suferas konsekvencojn de varmondoj kaj malalta humideco aŭ, se pluvas, devas vadi akvofluaĵojn por elsavi siajn havaĵojn, aŭ trafiĝas de granda kvanto da malpuraĵoj el la medio"*, li admonas.

Laŭ d-ro Saldiva, tia multflanka kaj integra agado favore al publika sano estas urĝa. Rilate al San-Paŭlo, li avertas, ke la

* "Rekomenda Dokumento pri Sano, San-Paŭlo, C40 2011" estis transdonita dum São Paulo C40 Large Cities Climate Summit, internacia kunsido okazinta de la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 2011, en la San-Paŭla ĉefurbo. En tiu kvara okazigo de la evento, urbestroj kaj reprezentantoj de plej grandaj urboj en la mondo interŝanĝis spertojn kaj diskutis agadojn por kontraŭbatalado kaj adaptiĝado al efikoj de klimataj ŝanĝoj, kiujn povas alpreni lokaj registaroj.

urba medimalpureco mortigas pli multe ol aidoso kaj tuberkulozo; kaj ĉeestas granda diferenco inter tiuj kazoj. *"Se mi inventus kuracilon kontraŭ tiuj malsanoj, tiam neniu kontraŭus ĝin, sed se oni dikutas, kiu uzos straton, omnibuson aŭ aŭtomobilon, kiun specon de bruligaĵo...? Ĉiu decido tiukampe atingas negocojn de miliardoj da dolaroj. Tial oni devas prezenti administran planon, necesas spici tiujn decidojn per scienca kono."*

La fakulo montras aliajn bezonatajn decidojn, kiuj dependas de kuna klopodo en diversaj kampoj. *"Ekzistas eblecoj por kontraŭbatali klimatajn ŝanĝojn, malpliigi eligadon de atmosfersufokaj gasoj, kiuj alportas tujan bonfaron al homa sano. Se ekzemple oni konstruas metroan linion, oni supozas, ke oni gajnas nur tempon, sed ĝi estas multe pli ol tio: oni ŝparas pli-malpli 350 mil petrolbarelojn jare, kaj ĉiu barelo kostas 120 dolarojn; tio estas multe da mono. Homoj povas dormi pli da tempo, ili gajnas sanon, kaj okazas malpliigo de bruo surface de la urbo kaj de malpurigado de la aero en la omnibusaj pasejoj. Ŝparo je ĉiu metroa linio en San-Paŭlo atingas proksimume 100 milionojn da dolaroj jare, tio estas, ĝi mem pagas siajn kostojn laŭ la tempo kaj laŭ bonfarado al sano."*

Laŭ tiu esploristo, estas nepre necese starigi *"politikon de aktiva transportoveturado"*, ekzemple, kun biciklaj ŝoseoj, kiuj permesu precipe aliron al malriĉaj homoj, kiuj elspezas signifoplenan parton de sia gajno pro kolektiva transportveturado. *"Tio krome devigus ilin korpekzerci, malpliigus trograsecon, kiu estas epidemia"*, li kompletigas.

## Defioj de giganturboj

D-ro Paulo Saldiva atentigas, ke granda parto el grandaj urboj en la mondo ne plu estas produktantoj de rimedoj por servoj. *"Sekve, ĉeestas lernejoj, komercejoj, moviĝado, kaj ili kreskis eksplode, sen taŭga strukturo koncerne loĝadon, medihigienon kaj transportadon. En tiuj regionoj, la problemo pri medimalpurigado rilatas al veturiloj, sed ekzistas aliaj aferoj tre seriozaj, kiuj influas la vivkvaliton: dezertigo de urboj, kiu pligrandigas medimalpurigadon; kaj rubaĵoj, kiuj prezentas emanaĵojn kaj favoras serion da malsanoj."*

Laŭ tiu kuracisto, post la listigo de demandoj rilataj al kolektiva bonfarto — kiel konsekvencoj de la neebleco plu iri surstrate; de la fakto, ke infanoj ne povas ludi, ĉar la loko taŭgas por pasado de aŭtomobiloj; de la forigado de riveroj kaj parkoj el grandaj urboj kaj enfermado de avenuoj per marĝenaj ŝoseoj, kiuj forigas civitanojn for de natura havaĵo — post tio, eblas pensi pri la speco de urbo, kiun ĉiuj deziras. *"Kaj mi ne parolas nur pri estetiko; ni reagas fronte al nia medio... se ĝi estas bona, ni havas pli bonan reagon. Tio rilatas al etiko, al homa digno, al starigo de sano"*.



Vivian R. Ferreira

Kuracisto Paulo Saldiva, kiu batalas por alpreno de transportiloj malpli medimalpurigaj, jam de multaj jaroj uzas biciklon por iri de sia hejmo al Fakultato de Medicino de USP, kie li laboras.




# Ekflugo al daŭripoveco

**_Direktoro pri Komunikado, Komerca Marko kaj Produkto de "Azul Linhas Aéreas Brasileiras", Gianfranco Beting, elstarigas la klopodon de la aviada sektoro por malpliigo de medidamaĝo_**

Antaŭeniras la diskutado pri daŭripova elvolviĝado kaj verda ekonomio, kaj sekve oni esperas, ke kresku ankaŭ la konscio pri investo pli kaj pli granda je teknologioj, kiuj kunigas ekonomian kreskon kaj zorgemon pri naturmedio, en ĉiuj produktaj kampoj en la socio. En ĵus farita intervjuo al programo *Biosfera*, de Bona Volo TV (kanalo 23 de SKY), la direktoro de Komunikado, Komerca Marko kaj Produkto de *"Azul Linhas Aéreas Brasileiras"**, **Gianfranco Beting**, montris kelkajn bonajn praktikojn de la entrepreno, kiuj aperas kiel novaj paŝoj de aviada kampo cele al daŭripoveco.

*"En nia ĉiutaga vivo, ni jam havas gravajn praktikojn por daŭripoveco. Ekzemple, aviadilo iras surtere*

*— tion oni nomas ‘taksii’ — kun unu el la motoroj haltigita dum certa tempo por malpliigi konsumadon de brulaĵo, por malpliigi eligadon de $CO_2$ kaj ankaŭ de bruo. ‘Azul’ estas entrepreno tute atenta pri la tripiedo ekonomio, socio kaj naturmedio”*, asertis la reprezentanto de tiu kompanio.

Laŭ Beting, la aviada industrio estas unu el tiuj, kiuj plej intense laboras por energioefikeco. *“Prezentu al vi, ke la gajnoj per energioefikeco en aviado atingas 73%, ekde la jaroj post 1960. Ĝi estas industrio, kiu febre laboras por ŝpari ĉiun guton da brulaĵo kaj malpliigi damaĝojn de gaseligado.”* Li emfazas, ke aviado de longe klopodas malpliigi naturmediajn damaĝojn kaŭzatajn de ĝi. *“En la jaro 2005, la ĉefaj aviadentreprenoj en la mondo kunvenis kaj decidis, ke ĝis la jaro 2020 ili malpliigos eligadon de $CO_2$ je 50%. Kaj ĉi tio jam okazas; tio estas, ni pensas, ke ni atingos tiun celon.”* Kaj la direktoro kompletigis: *“Eĉ se ĝi [aviado] estas industrio kun majestaj ciferoj, tamen ĝi laboras de longa tempo por alpreni efikecon. Do, mi dirus, ke certe ĝi estas unu el la plej verdaj industrioj en la mondo.”*

Tiu informo estas des pli grava, se oni konsideras la antaŭkalkulojn en aviada kampo, kiu nuntempe transportas ĉirkaŭ 2,5 miliardoj da homoj ĉiujare, laŭ la ĝenerala sekretario de ICAO (International Civil Aviation Organization), **Raymond Benjamin**. Laŭ antaŭkalkulo de la plej granda monda fabrikanto de komercaj aviadiloj, nome Airbus, la nuntempa aro da aviadiloj en la tuta mondo — 15 mil flugmaŝinoj — certe duobliĝos ĝis la jaro 2030.



Diskonigo de Azul


Gianfranco Beting, reklamisto kaj fakulo pri aviado.

## Aktiva partopreno en Rio+20

Laŭ Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Daŭripova Elvolviĝo, nome Rio+20, la sektoro de komerca aviado promesis aktivan partoprenon en la diskutoj. *“Ekzistas agendo, kiu estos parto de la programo de Rio+20, kaj en ĝi oni konsideros gravajn punktojn de industrio kaj oni konfirmos kelkajn kompromisojn. Ni ĉeestos aktive, ne kiel spektantoj de la diskutotaj aferoj. Ni estos partoprenantoj en tiu proceso”,* deklaris li.

Gianfranco Beting estas pasie interesita pri sia laboro, kaj li kredas, ke diskutado pri tiu kaj aliaj gravaj temoj faras, ke la tuta socio pripensu la urĝan bezonon je ŝanĝo. *“Vi povas bani vin, brosi viajn dentojn, promenigi vian hundon, ekzemple, en daŭripova maniero. Mi pensas, ke ĉi tiu estas grava mesaĝo: ‘Kion mi povas fari kiel terano por kunlabori por agendo pri daŭripoveco?’”*, li diris.

* Je la 28-a de majo 2012, aviadentrepreno “Azul”, la tria plej granda en nia lando, kaj Trip, la plej granda regiona entrepreno en Ameriko, interkonsentis pri kunigo de siaj agadoj en Brazilo. Kun entute 112 aviadiloj kaj po 837 flugoj ĉiutage, tiu grupo respondecas pri 29% el la flugoj en tiu lando, servante al 96 el 108 brazilaj urboj, kiuj akceptas regulajn flugojn.



shutterstock.com

# Katastrofemo pri naturmedio

**Beatriz Fagundes**



Diskonigo/Jornal *O Sul*

Beatriz Fagundes estas radikomunikanto jam de 25 jaroj. Per Radio Pampa, ŝi prezentas ĉiutagan programon jam de ĉirkaŭ 18 jaroj, de la 6-a ĝis la 12-a horo. Ŝi estas ankaŭ rubrikisto en ĵurnalo *"O Sul"*, de Reto Pampa de Komunikado.

Jen estas kaptilo, kiu povas kapti iun ajn, iam ajn. Mi apartenas al generacio, kiu sekvis homon, kiu ĉefrolis en la unuaj ekologiaj movadoj en la mondo. Per Radio Pampa AM 970 kHz, mi havis la plezuron intervjui **José Lutzenberger** (1926-2002), **Flávio Lewgoy**, **Zilda Zimmermann**, **Sebastião Pinheiro**, **Caio Lustosa**, **Magda Renner** kaj aliajn, kiuj en la jardeko post 1980 havis sentemon kaj saĝecon percepti damaĝan agadon de la homo rilate al ĉiaj specoj de vivuloj en la planedo. Nuntempe, post pli ol tri jardekoj, estas neeble trovi iun, kiu ne

rekonas la bezonon pri radikala ŝanĝo en sinteno de nia civilizacio, koncerne harmonian kunvivadon kun la Tero.

Pro vivmaniero, laŭ kiu konsumado estas obsedo, antaŭvidoj atingis alarmajn nivelojn, kio montras scenejojn de malluma estonteco por la Homaro. Iuj hipotezoj eĉ anoncis la morton de miliardoj da homoj jam je la transiro al la nuna jarcento. Laŭ tio, ni vivas ombrecajn tagojn, sen perspektivoj por novaj generacioj.

Mi konfesas, ke mi estis plene kontenta pri la intervjuo donita de la brita sciencisto **James Lovelock** al informreto MSNBC. Li estis la unua, kiu antaŭvidis, ke monda varmiĝo malpliigos la Homaron al manpleno da rifuĝintoj en Arkto. En tiu intervjuo, li akceptis, ke li troigis rilate katastrofemon. Li kreis la hipotezon de Gaja, li estis guruo en la movado por naturmedio kaj unu el la plej influaj pensuloj rilate demandojn pri la naturmedio, je sia 92-jara aĝo Lovelock certe estas unu el la plej apokalipsecaj nomoj koncerne la efikojn de klimataj ŝanĝoj. Li rekonis, ke li estis *"alarmulo"* je siaj antaŭvidoj. *"Mi troigis, mi paŝis tro foren"*, diris la sciencisto, laŭ kiu klimato faras siajn ĉiamajn trukojn. *"Fakte ankoraŭ nenio okazas nun. Tiuokaze, ni devus esti mezvoje al mondo en stato de 'fritiĝo', nun."*

## Semantoj de ia nova vidmaniero

En la jaro 2013, James Lovelock devos lanĉi unu plian verkon, kiu estos parto de trilogio kune kun la libroj *La Venĝo de Gaja* (pri tio, kiel la mondo fariĝas netaŭga por homoj kaj kiel ni povus postvivi) kaj *Gaja: Fina Atentigo*. En sia nova verko, la aŭtoro diskutos pri manieroj, kiel la Homaro helpos reguligi la planedon. En tiu sama intervjuo, Lovelock indikis du aliajn ekzemplojn de alarmemaj antaŭvidantoj: **Al Gore**, kun sia dokumenta filmo *Malkomfortiga Verajo*, kaj **Tim Flannery**, aŭtoro de la verko *Administrantoj de la Tempo*.

Certe ni ne estas survoje al pleneco, paco kaj abundo, kio estas revo de ĉiuj homoj de Bona Volo. Tamen, nome de nia neskuebla Fido pri la Kreanto, estas neeble kredi, ke Lia projekto por la Homaro estas alia ol tiu de vivado sur la Tero, survoje al spirita evoluo, por kio ni estas kreitaj!

Pro ĉiu naskiĝanta infano, ni devas kredi kun absoluta certeco, ke la estonteco de la Homaro estas garantiita, nome de Amo! Eĉ sciante, ke ni povos sperti turmentajn momentojn, kiam nia Fido submetiĝos al elprovo. Eĉ se plej simpla estas nia laboro, per ĝi ni povos volonte agi kiel semantoj de ia nova vidmaniero rilate la homon kaj la ceterajn vivulojn sur ĉi tiu blua planedo. Alvenos ŝanĝo, kaj kun ĝi novaj modeloj formos la estontecon! Mi kredas tion! Nome de miaj du nepoj, **Gabriel** kaj **Arthur**! La Homaro kreiĝis por gloro kaj por adorado al la Eterna Patro!

***Eĉ se plej simpla estas nia laboro, per ĝi ni povos volonte agi kiel semantoj de ia nova vidmaniero rilate la homon kaj la ceterajn vivulojn sur ĉi tiu blua planedo.***



shutterstock.com

ANALIZOJ KAJ PERSPEKTIVOJ

# Novaj defioj por la socia problemo

**Daniel Arroyo**

Diskonigo



Daniel Arroyo, prezidanto de "Civitana Povo" kaj eksvicministro pri Socia Elvolviĝo en Argentino.

Latinameriko trapasis gravan kreskon dum la lasta jardeko, kio kaŭzis sufiĉe da plibonigoj en la sociaj indikdatumoj de ĉiuj landoj en tiu regiono. Tamen, ni pensas, ke tiun ĝeneralan rekonon de plialtigo de socia kondiĉo oni devas kompletigi per pli strikta analizo pri novaj konfliktoj kaj streĉaj situacioj. Tiu ekvilibro permesos, ke oni kreu politikojn trafajn por batalado kontraŭ malriĉeco kaj malegaleco, kiuj ankoraŭ atingas multajn latinamerikanojn.

Dum la tempo inter la jaroj 2002 kaj 2007, tiu regiono atingis kreskon de Malneta Enlanda Produkto (MEP), kiu ebligis plibonigon en sociaj indikdatumoj koncerne malriĉecon kaj mizeron. Tamen, post la internacia financa krizo en 2008, plialtigo de prezoj de nutraĵoj, kresko de inflacio kaj faktoroj propraj al ĉiu aparta lando bremsis tiun tendencon.

Koncerne amplekson de malriĉeco, Argentino kaj Ĉilio povus okupi lokon en unua grupo kun malaltaj aŭ mezaltaj niveloj. Ankaŭ Brazilo sukcesis malgrandigi indikdatumojn kaj eble troviĝus inter landoj kun nelaltaj niveloj de malriĉeco. Iel ajn, plej grava problemo estas sociekonomia malegaleco, kiu daŭras. Simile okazas en Meksiko, kie elstaras ankaŭ malriĉeco en kamparaj regionoj. Plej granda amaso da homoj en situacio de malriĉeco estas en Peruo, en Kolombio kaj en Ekvadoro. En tiuj landoj ili ankoraŭ konsistigas gravan parton de la loĝantaro: inter 40% kaj 55%, kiel mi detale montras en la eseo "Tendencoj en sistemo de socia protektado en Latinameriko", publikigita en la jaro 2010.

Tiu regiono enhavas ankoraŭ unu el la plej grandaj malegalecoj en la mondo, kio malhelpas aliron de multaj homoj al

dignaj kondiĉoj de bonfarto kaj civitaneco. Malgraŭ ia tendenco al plibonigo de enspeza distribuo en plej multaj pristuditaj landoj, tamen temas pri tre malmultsignifa malpliigo en la situacio de malegaleco, ĉar ĝi ne ŝanĝas la modelon de koncentriĝo de mongajno kaj nivelo de malriĉeco en regiona nivelo, kiu estas klare neegaleca. Tiaj malegalecoj malhelpas aliron al bazaj servoj, kiel sano kaj edukado, kaj al enkonduko en la mondon de laboro, aparte flanke de la junulara grupo en pli malriĉaj tavoloj.

Latinameriko estas regiono kun vastaj teritorioj kaj multaj naturaj rimedoj, kun granda potencialo por kreskado kaj pli ol du jardekoj da praktikado de demokratio. La estonteco estas promesplena. Dependos de ni la ebleco havi pli integrajn sociojn en la jaro 2020. La internacia situacio, malgraŭ variado en ekonomio kaj en politiko, ŝajnas doni al ni novan ŝancon. Ni devas ne neglekti ĝin.

## Socia elvolviĝo

Plibonigo en viv- kaj laborkondiĉoj paralelas serion da ŝlosilaj defioj por la proksimaj jaroj, kiujn jen oni listigas laŭ la sekvanta ordo:

**1.** Publikaj politikoj devos atenti pri socia inkluzivigo de junuloj, kun prioritato pri edukado, sekureco kaj laboro. Necesas amasaj planoj por kapabligo kaj alirebleco de novaj generacioj al laborlokoj, kun pli ampleksa reto de orientado.




**2.** En latinamerikaj landoj, plej multaj homoj el la malriĉa loĝantaro koncentriĝas en grandaj urboj. Unu el la restantaj taskoj en socia politiko estas starigo de specifaj agoj laŭ tiuj realaj situacioj, per kunigo de socia asistado, baza infrastrukturo, publika sekureco, neformala labormerkato kaj jura povo.



**3.** La esenca problemo estas socia malegaleco kaj la fakto, ke kvankam tiuj inkluzivigaj procedoj malpliigis malriĉecon, tamen ili ne sukcesis malpliigi la distancon inter plej riĉaj kaj plej malriĉaj homoj. Tiu elemento estas fonto de streĉo kaj de perforto, ĉar ĝi kaŭzas relativan malhavecon (diferencon inter la espero pri konsumado kaj la reala mongajno). Ekonomiaj rimedoj estas necesaj por ŝanĝi tian situacion, krom universalaj politikoj kapablaj transdoni rimedojn al pli malriĉa loĝantaro. Ŝajne same necesas alpreni pli strukturecajn proponojn rilate ekonomion, ekzemple procedojn de devigaj reformoj kaj analizadon rilate impostosistemojn en tiuj landoj.







**4.** Mikrokredito klare aperas kiel strategio por malpliigo de malriĉeco, se oni konsideras, ke homoj kun pli malalta mongajno esence bezonas kapitalon por renovigi maŝinojn kaj teknologiaĵojn kaj fari salton en la skalo de produktoprocedo. Ekonomia kresko en tiu regiono ebligus okazon antaŭenpuŝi tiajn politikojn larĝakvante.



**5.** Oni rimarkis, ke dum la lastaj jaroj okazis neegalaj progresoj en latinamerikaj landoj, koncerne organizadon de partopreno, kaj oni ne sukcesis firmigi instituciajn, daŭrajn meĥanismojn por laboro inter Ŝtatoj kaj civila socio. Fronte al nuntempa diskutado pri la bezono malcentrigi publikajn fondusojn, kiuj tro multe koncentriĝas, reaperas la propono stimuli lokan partoprenadon de komunumaj instancoj.



# INTERSEKTORA FORUMO

## RETO SOLIDARA SOCIO

6-a Foiro pri Novigoj apoge al Ministeria Jara Revizio de Ekosok/UN

Realigo LBV



shutterstock.com

# VERDA EKONOMIO

## *kaj malpliigo de malriĉeco*

Mariane de Oliveira

***Evento realigita de LBV en urboj de Sudameriko kunigas bonajn praktikojn por daŭripoveco***

**Kie?**

***Brazilo***
- Rio-de-Ĵanejro
- Braziljo
- San-Paŭlo
- Londrina

***Paragvajo***
- Asunciono

***Bolivio***
- La-Pazo

***Urugvajo***
- Montevideo

***Argentino***
- Bonaero

**Kiam?**

***inter la 13-a kaj la 28-a de marto 2012***



## BONAERO

PRELEGANTOJ KAJ AŬTORITATULOJ, KIUJ ĈEESTIS

- ***Daniel Arroyo,*** *prezidanto de "Civitana Povo" kaj eksvicministro pri Socia Elvolviĝo en Argentino;*
- ***Eduardo Amadeo,*** *nacia deputito;*
- ***Carolina Stanley,*** *ministrino pri Socia Elvolviĝo de la Registaro de Urbo Bonaero;*
- ***Inés Nevarez,*** *plenumdirektorino de "Grameen Argentina";*
- ***Guadalupe Tagliaferri,*** *subsekretariino de Apogado de la Ministerio de Socia Elvolviĝo de la Registaro de Urbo Bonaero;*
- ***Mónica Sladogna,*** *direktorino de Institucia Plifortigo de Ministerio de Laboro, Dungo kaj Socia Sekureco;*
- ***Guillermina Lazzaro,*** *plenumdirektorino de Suda Konuso, Ashoka Argentino;*
- ***Ana Vittar,*** *fakulino pri Soci-eduka Politiko de OEI en Argentino;*
- ***Carlos Caballero,*** *kunordiganto pri Edukado de LBV en Argentino.*

Rezultoj de la 9-a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 6-a Foiro pri Novigoj, realigita de Legio de Bona Volo en urboj en kvin sudamerikaj landoj, inter la 13-a kaj 28-a de marto 2012, elmontras gravan kontribuon al diskutoj en Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Daŭripova Elvolviĝo (Rio+20) kaj en la Altnivela Kunsido de Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (Ekosok/UN). Partoprenis la eventon aktivuloj, administrantoj kaj profesiuloj el organizoj de la civila socio, entreprenoj kaj publikaj instancoj, krom profesoroj kaj studentoj interesitaj pri interŝanĝo de konoj kaj firmigo de kunlaboro, kiu favoru "malpliigon de malriĉeco kaj plimultigon de dungado kaj de deca laboro en kunteksto de verda ekonomio", afero kiu direktis la laborojn tiujare.

La naŭa realigo de tiu forumo havis la apogon de Departemento de Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de UN (UN/Desa), en Novjorko, Usono, kaj la apogon en landoj fare de la centroj de informado de Unuiĝintaj Nacioj (UNIC Rio kaj CINU Paragvajo) kaj de Programo de Unuiĝintaj Nacioj por Disvolviĝo (PNUD Brazilo kaj Paragvajo), krom aliaj kunlaborantoj.

Bonaj praktikoj alprenitaj en tiu serio da renkontiĝoj kaj en la demandaro proponita de portalo www.boavontade.com taŭgis kiel bazo por la raporto, kiun LBV organizis por prezento al plej elstaraj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj.

### Homaj rajtoj kaj forigo de mizero

Homaj rajtoj asertas, ke ĉiu homo, sendepende de nacieco, etno, religia kredo aŭ ia ajn alia kondiĉo, rajtu dignan vivon. Por tio, estas nepre necesa alirebleco al bonkvalitaj edukado, nutrado, laboro, sano, interalie. Tamen, la raporto de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Agrokulturo kaj Nutrado (FAO) notis tute alian realaĵon: inter la jaroj 2006 kaj 2008 (pli freŝaj datumoj

> ***"Tiu forumo estas grava loko, por ke ni povu rekoni, ke la sola maniero transformi la realecon estas kunlaboro inter la Ŝtato kaj la civila socio. Ni bezonas kaj devas ĉiam akompani tion."***
>
> **Guadalupe Tagliaferri**
> Ministerio pri Socia Elvolviĝo de la Registaro de Urbo Bonaero

Arkivo BV



Bonaero, Argentino

estas disponeblaj), ĉirkaŭ 850 milionoj da homoj malsatis en la mondo.

Tial, forigi mizeron, en kiu ankoraŭ troviĝas multaj komunumoj, postulas strebadon kaj sindediĉon flanke de ĉiuj partoj de la socio. En tiu kunteksto, Legio de Bona Volo efektive kontribuadas por plibonigo de vivkvalito de familioj kun malalta mongajno, pere de edukado per sia eduka reto, per socioedukaj programoj, per kampanjoj por homama helpo kaj per forumoj, kiujn ĝi aŭspicias.

Diskutoj okazintaj en Braziljo, Bonaero kaj Montevideo emfazis la konsideradon pri efikaj proponoj por malpliigo de malriĉeco en sistemo de verda ekonomio. Pri tiu afero, en la brazila federacia ĉefurbo, la politiksciencisto kaj oficisto de PNUD **Juliana Wenceslau**, kiu reprezentis s-ron **Jorge Chediek**, loka kunordiganto de Sistemo UN en Brazilo kaj loka reprezentanto de PNUD en ĉi tiu lando, elstarigis, ke ĝi plu estos esence grava en agendo de landoj dum la proksimaj jaroj. *"Kelkaj landoj defendas, ke la Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC) devas transformiĝi en Celojn por Daŭripova Elvolviĝado (ODSs), kaj malpliigo de malriĉeco, socia inkluzivado kaj malpliigo de malegaleco plu estas centra afero, nome la granda akso, sed tiun aferon ĉirkaŭas iuj celoj al daŭripoveco."* Ŝi emfazis la progresojn, kiujn Brazilo atingis dum la lastaj 12 jaroj: *"Brazilo plu forte strebas al la Jarmilaj Evoluigaj Celoj. Kaj ĝi bone iradas. Ni jam atingis la celon numero 1, nome malpliigon de malriĉeco je duono kaj la celon numero 2, nome universaligon de edukado (...)".*

Laŭ profesoro **Yamandú Ferraz Zaballa**, direktoro de Sekcio pri Prizorgado de Komunumoj kaj Homgrupoj sub Risko el la Ministerio de Socia Elvolviĝo en Urugvajo, la iniciato de la Institucio helpas batali kontraŭ unu el la baroj al daŭripova elvolviĝo: *"La iniciato de LBV estas interesa. Estas tre grave por progreso de familioj, ke ili havu bazajn rimedojn por vivi pli bone."*



## MONTEVIDEO

PRELEGANTOJ KAJ AŬTORITATULOJ, KIUJ ĈEESTIS

- ***Andrés Scagliola,*** *nacia direktoro pri Socia Politiko de Ministerio de Socia Elvolviĝo;*
- ***Álvaro Máximo Sanchez Cortazzo,*** *teknika asesoro de Nacia Direktado de Dungo de Ministerio de Laboro kaj Socia Sekureco en Urugvajo;*
- ***Yamandú Ferraz Zaballa,*** *direktoro de Sekcio de Prizorgado de Komunumoj kaj Homgrupoj sub Risko de Ministerio de Socia Elvolviĝo en Urugvajo;*
- ***Alejando Lopez,*** *el la movado "Tacurú";*
- ***Adriana Savio Corvino,*** *studentgvidantino en Fakultato de Psikologio de Universidad de la República;*
- ***Miguel Piñeyro,*** *prezidanto de Urugvaja Reto de NRO-oj por la Naturmedio.*






Montevideo, Urugvajo

Letícia Ferreira



**BRAZILJO**

*PRELEGANTOJ KAJ AŬTORITATULOJ, KIUJ ĈEESTIS*

- ***Rômulo Paes**, plenumsekretario de Ministerio de Socia Elvolviĝo kaj Batalado kontraŭ Malsato (MDS);*
- ***Daniel Seidel**, sekretario pri Socia Elvolviĝo kaj Transdonado de Mongajno en la Federacia Distrikto (SEDEST);*
- ***Juliana Wenceslau**, reprezentantino de la loka kunordiganto de Sistemo UN en Brazilo kaj loka reprezentanto de Programo de Unuiĝintaj Nacioj por Elvolviĝo (PNUD), Jorge Chediek;*
- ***Márcia Muchagata**, fakulino pri Publika Politiko kaj Registara Administrado kaj asesoro de Plenumsekretariejo de MDS;*
- ***Elson Valim**, plenumdirektoro de Fondaĵo Dom Cabral;*
- ***Leisa Perch**, fakulino pri Publikaj Politikoj kaj kunordiganto de Kampara Daŭripova Elvolviĝo de Internacia Centro de Politikoj por Inkluziviga Kreskado;*
- ***Suelí Periotto**, superrigardantino de pedagogia gvidlinio de Legio de Bona Volo kaj direktoro de Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo;*
- ***José Santiago Naud**, profesoro kaj kunfondinto de Universitato de Braziljo (UnB).*



Braziljo, Brazilo

Fotoj: Lucian Fagundes



La garnituroj donitaj al partoprenantoj en la forumo kaj al ĉeestantaj organizoj en Rio-de-Ĵanejro kaj en Braziljo, Brazilo, respektis la temon de la evento. Ĉiuj sakoj kaj skribilujoj estis faritaj de NRO Loĝejo kaj Civitaneco, kunlabore kun Instituto Cooperforte kaj kun Asocio de Oficistoj de "Caixa Econômica Federal", kiuj utiligis por tiu laboro materialon reprofititan. Eldonejo kaj Grafikejo Ativa respondecis pri la produktado de tekoj.

## Konverĝo al novaj tempoj

Plenum-sekretario el la Ministerio pri Socia Elvolviĝo kaj Batalado kontraŭ Malsato (MDS), **Rômulo Paes**, alportis sian kontribuon al Intersektora Forumo Reto Solidara Socio. En tiu prelego, okazinta en Braziljo, li emfazis: *"Necesas tutmonda strebado al tiuj, kiuj produktas kaj de tiuj, kiuj jam atingis gradon de tre rapida elvolviĝo, por ke eblu konverĝi al pli racia modelo, pli interesa por ĉiuj."*

Laŭ Rômulo Paes, la fakto, ke la evento havas kiel sidejon LBV estis tre signifoplena. *"(...) Estas tre favoraŭspicie, ke en ekumena domo ni diskutas precize konverĝojn; ke en Institucio, kiu tiom multe pledas por Ekumenismo, ni diskutas tian komplikan temon, esencan en logika kompreno kaj precipe en produktado de nova kondiĉo, favora kaj ege bonfartiga por ni ĉiuj."*

> *"Estas ĉies rajto havi dignon, mongajnon. Pro tio, la Ŝtato devas strebi por perspektivo de garantio pri tiaj rajtoj."*
>
> **Daniel Seidel**
> de Sedest

# Bazo por soci-media protekto

*“Kreski, inkluzivi, protekti”*, jen estas la slogano, kiun la brazila reprezentantaro elektis kiel resumon en la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Naturmedio kaj Elvolviĝo, nome Rio+20. Inter la proponoj de nia lando estas tiu, krei bazon por soci-media protekto. Laŭ tiu programo, oni garantios bazajn servojn, kiel sano, nutra sekureco, trinkebla akvo kaj media higieno, krom financa helpo al familioj registritaj fare de servo de protektado de arbaroj kaj replibonigo de damaĝitaj regionoj. Tiu propono antaŭvidas minimuman mongajnon por kontraŭbatali ekstreman malriĉecon.

Parolante pri tiu iniciato, okaze de la 9-a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 6-a Foiro pri Novigoj, en Braziljo, **Márcia Muchagata**, fakulino pri Publika Politiko kaj Registara Administrado, asesoro de la Plenumsekretariejo de Ministerio de Socia Elvolviĝo kaj Batalado kontraŭ Malsato, diris: *“Ni ne rajtas akcepti, ke homoj malsatas, ke ili ne havas kondiĉojn necesajn por loĝado. Ĉiuj devas havi dignon. Ĉirkaŭ 11% el la loĝantaro en la mondo konsumas 80% el la rimedoj. Jen oni devas ion alĝustigi.”*

Laŭ la asesoro de MDS, malriĉeco estas afero *“multdimensia”*. Kaj ŝi klarigis: *“Oni devas doni ne nur mongajnon, sed ĉiu homo rajtu manĝi, havi la minimumon por postvivado kaj ankaŭ rajton pri minimuma media kvalito. Kiam oni komencis la diskuton pri daŭripova elvolviĝo, en la jardeko post 1970, oni diris, ke ni ĉiuj rajtas ĝui bonkvalitan medion, sanan medion, kaj ke oni devas havigi tion al la tuta loĝantaro”.*

***Foiro pri Novigoj, en Braziljo, kiu kunigis kunlaborantajn organizojn dum la 9-a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio. Tiuokaze, ili prezentis siajn sukcesajn projektojn al la publiko. Ili estas:***

- *Loĝejo kaj Civitaneco;*
- *Centro de Kulturo kaj Elvolviĝo en Paranoá kaj Itapoã;*
- *Instituto Nova Civitaneco;*
- *Asocio Kreantaj Manoj;*
- *Instituto Nair Valadares;*
- *Asocio de Gepatroj kaj Amikoj de Mensmalvantaĝuloj (APAE) de la Federacia Distrikto;*
- *Brazilja Asocio de Vidhandikapitoj;*
- *Asocio de Gepatroj kaj Amikoj de Mensmalavantaĝuloj kaj Handikapitoj en Taguatinga kaj Ceilância (APAED);*
- *SISCARLEG;*
- *Paŝtistoj de Infanoj; kaj*
- *Asocio de Kancerhavaj Virinoj (AMACC).*

Vinícius Bueno



1 San-Paŭlo, Brazilo



2 Londrina, Brazilo

Paulo Araújo

Dum trejnkunsido en San-Paŭlo, d-rino **Lúcia Bludeni**, prezidanto de Komitato pri Juro de la Tria Sektoro de Ordeno de Advokatoj de Brazilo (OAB-SP), prelegis pri la temo “Daŭripova advokatlaboro”. (2) Prelegis en la urbo Londrina **Paulo Bassani**, kunordiganto de Grupo por Studoj kaj Avangardaj Esploroj pri Naturmedio (GEAMA); **Solange Vicentin**, aktivulo pri Defendo de Naturmedio; **Luís Cláudio Galhardi**, prezidanto de “Londrina Pazeando”; kaj **Eliene Moraes**, fakulo pri administrado de naturmedio.



### RIO-DE-ĴANEJRO

*PRELEGANTOJ KAJ AŬTORITATULOJ, KIUJ ĈEESTIS*

- ***Daniel Borges Nava,** sekretario pri Mineralekstraktado, Geologia Diverseco kaj Akvorimedoj en subŝtato Amazono;*
- ***Aspásia Camargo,** ŝtata deputito kaj partoprenanto en Nacia Komisiono por Organizado de Rio+20;*
- ***Neilton Fidelis da Silva,** esploristo kaj teknika asesoro de Plenumsekretariejo de Brazila Forumo pri Klimataj Ŝanĝoj;*
- ***Sheila Pimentel,** prezidantino de Instituto Humanitare, en San-Paŭlo;*
- ***Suelí Periotto,** superrigardantino de la pedagogia gvidlinio de Legio de Bona Volo kaj direktoro de Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo.*



### LA-PAZO

*PRELEGANTOJ KAJ AŬTORITATULOJ, KIUJ ĈEESTIS*

- ***Jorge Postigo Dupleich,** kunordiganto de Fakultato de Inĝenierarto kaj Ekzaktaj Sciencoj de Universidad Católica Boliviana (UCB);*
- ***Melina Balderrama,** inĝenierino de UCB;*
- ***Elizabeth Mac Lean,** el Fondaĵo por Daŭripoveco kaj Elvolviĝo;*
- ***Kathia Salazar,** el projekto Urbaj Edukistoj;*
- ***Daniel Borges Nava,** sekretario pri Mineralekstraktado, Geologia Diverseco kaj Akvorimedoj en subŝtato Amazono;*
- ***Jaime Perez Coronel,** el Fondaĵo Jubileo.*

# Daŭripoveco estas vivo

Starigi daŭripovan elvolviĝon, eviti perdon de biologia diverseco kaj plibonigi la parton de la loĝantaro kiu havas alireblecon al trinkebla akvo kaj medihigieno estas kelkaj el la celoj atingendaj en landoj ĝis la jaro 2015, laŭ la propono de la sepa Jarmila Evoluiga Celo — “Vivkvalito kaj respekto al la naturmedio” — kiun subskribis en la jaro 2000 Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, kune kun siaj ŝtatoj-membroj.

Kontribue al la plenumado de tiu kaj de aliaj celoj, en urboj Rio-de-Ĵanejro, Asunciono kaj La-Pazo, diskutoj en intersektora forumo pritraktis la temon “Verda ekonomio”. Prelegantoj kaj partoprenantoj pripensis la konsekvencojn de homaj agadoj en estonteco de novaj generacioj kaj pri la manieroj ne damaĝi ĝin. Laŭ s-ro **Rodrigo Muzzi**, direktoro de strategia planado de Sekretariejo pri Naturmedio en Paragvajo, la okazigo de tiu evento *“estas nobla iniciato, en la senco, ke ĝi kontribuas por konsciigo de homoj pri alpreno de iuj sintenoj koncerne tiujn aferojn, kiun oni internacie pridiskutas.”*

En Rio kaj en La-Pazo, geologiisto **Daniel Borges Nava**, sekretario pri Mineralekstraktado, Geologia Diverseco kaj Akvorimedoj en subŝtato Amazono, Brazilo, prezentis la temon “Agendo por daŭripova elvolviĝo: registara administrado de akvorimedoj — ĝia interrilato kun malpliigo de malriĉeco kaj klimataj ŝanĝoj”. Tiuokaze, li substrekis: *“Granda parto de la ekzistanta akvo estas sala. (...) Disponebla akvo [adekvata por homa konsumado], tiu akvo el riveroj, lagoj, kaj tiu, kiu estas liverata al granda parto de la loĝantaroj kaj donas al ni la tutan kvaliton necesan al vivo, kalkuliĝas je 0,3%. Sekve, nia respondeco staras en la defio pri kvalito en konservado de akvo. Ĉi tiu estas la granda batalo, ĉar ĝia kvalito dependas de ĉiu el ni, de la kompromiso pri daŭripoveco, kiun ni devas atingi. (...) Kiam mi ne povas havigi al mi bonkvalitan akvon, tiam estas multe pli malfacile, ke mi ekonomie elvolviĝu, ke mi havu bonan vivkvaliton, havigu civitanecon al homo”*. Kaj la preleganto kompletigis: *“Eblas ekonomie elvolviĝi, sed tio de-*

André Fernandes



Rio-de-Ĵanejro, Brazilo

Juan Lobatón




La-Pazo, Bolivio

Fotoj: Allison Bello




En la paragvaja ĉefurbo, prelegas **Suelí Periotto**, superrigardantino de la pedagogia gvidlinio de Legio de Bona Volo kaj direktorino de Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, en San-Paŭlo, Brazilo, staras flanke de lernantoj de Kolegio Pablo Ávila, kiuj estas kontentaj pro sia partopreno en la kunsido.



Rodrigo Muzzi, el la Sekretariejo pri Naturmedio en Paragvajo, kun la libro *Urĝas Reeduki!*, de la verkisto Paiva Netto. Pecoj el tiu verko, prezentitaj dum la prelego de LBV, vekis atenton de la preleganto.

*vas okazi kune kun respondeco pri la naturmedio kaj socio, per kunigo de rilatoj inter solidareco kaj daŭripoveco, kio koncernas la aferon pri Amo al nia planedo, al kundividado."*

Ĉeestis tiun eventon en Rio-de-Ĵanejro ankaŭ s-ino **Sheila Pimentel**, direktoro-prezidanto de Instituto Humanitare (San-Paŭlo), kaj ŝi tre emociiĝis pro la kanzonoj aludantaj konservadon de naturmedio prezentitaj de Ekumena Infan-Junula Koruso Bona Volo, nome konscio, kiun infanoj prizorgataj de LBV montras en sia ĉiutaga vivo. Tiuokaze, ŝi komentis: *"Lerni principojn kaj bonajn valorojn estas nepre necese por ke oni ŝanĝu nian planedon. (...) Mi esperas, ke LBV konstruu, kun tiuj infanoj, generacion 2050. Mi estas tre fiera."*

La agado de tiu Institucio favore al la homo kaj al la planedo vekis la atenton de d-ino **Aspásia Camargo**, ŝtata deputito en Rio kaj partoprenanto en Nacia Komitato por Organizo de Rio+20. *"Mi tre admiras tiun socian laboron de LBV, kiu konstruas retojn kaj preparas homojn eduke por foriri el mizero kaj eniri en tempon de daŭripoveco ankaŭ por homoj."*

Aktiva partopreno de junuloj en diskutoj de la forumo estis same decida por la pozitiva rezulto de tiu evento. Unu ekzemplo alvenis el la diskutoj en Paragvajo, kie unuan proponon por la fina raporto faris lernantino en Kolegio Pablo Ávila. Tiuokaze, ŝi emfazis ankaŭ la ŝancon donitan al novaj generacioj, ke ili rajtu paroli en diskutoj pri temoj, kiuj elstaris en la forumo.

En Bolivio, prelegis **Kathia Salazar**, reprezentanto de Projekto Urbaj Edukistoj, kaj ŝi alvokis la ĉeestantajn junulojn en Universidad Católica Boliviana San Pablo (UCB), kie okazis la evento, ke ili partoprenu agadojn por ŝanĝo favore al daŭripoveco de nia mondo.




En la paragvaja ĉefurbo, infanoj de LBV sin prezentis dum la forumo, okazinta en la Nacia Parlamento.



## ASUNCIONO

PRELEGANTOJ KAJ AŬTORITATULOJ, KIUJ ĈEESTIS

- ***Mirta Denis**, el socia kabineto de la Respublika Prezidento;*
- ***Rodrigo Muzzi**, direktoro pri strategia planado de Sekretariejo pri Naturmedio;*
- ***Oscar Barrios**, direktoro pri Esplorado kaj Postdiplomaj Studoj en la Fakultato de Ekonomikaj Sciencoj de Universidad Nacional de Asunción;*
- ***Edgar Garcia**, reprezentanto de Fondaĵo Moises Bertoni;*
- ***Carmen Sosa**, reprezentanto de Reto PEA, de UNESKO;*
- ***Ladislao Cardozo**, estro de Departemento de Plenumado de Sekretariejo de Socia Agado;*
- ***Aída Robles**, nacia deputitino;*
- ***Mario Cano**, senatano kaj prezidanto de Komisiono pri Energio, Naturaj Rimedoj, Loĝantaro, Naturmedio, Daŭripova Produktado kaj Elvolviĝo en la Senato;*
- ***Antônio Sanches**, prezidanto de Komisionoj de la Senato.*



# *Deklaro de LBV al la evento Rio+20 kaj al la Altnivela Kunsido 2012 de Ekosok/UN*

Sekve kaj reliefe aperos elprenaĵoj de la deklaro de Legio de Bona Volo (LBV) sendita al Unuiĝintaj Nacioj kaj celanta la eventon Rio+20 kaj la Altnivela Kunsido de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN (Ekosok), en 2012, kies temo estas *"Antaŭenigi produktadon, dungadon kaj decan laboron por elradikiĝo de malriĉeco kadre de evoluigo ekonomie justa, daŭripova kaj ĉianivele inkludanta, por plenumo de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj"*.

La rekomendoj estas frukto da sperto de pli ol ses jardekoj de LBV en tiu kampo kaj de la rezulto de vastaj mobilizo-klopodoj de la Tria Sektoro, de la Akademio, de la privata iniciato kaj de la registaro, realigitaj de la Institucio pere de la 9a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 6a Foiro pri Novigoj, kiam disvolviĝis serio da eventoj inter la tagoj 13a kaj 28a de marto 2012, en latinamerikaj urboj.

## Verda ekonomio kaj Solidara Elvolviĝado

La menciita dokumento celas reliefigi kelkajn punktojn ree diskutitajn. La unua el ili temas pri la uzo mem de la koncepto pri "verda ekonomio". Estas



Vivian R. Ferreira

ia maltrankvilo pri tio ke ĝia uzo favorigu la ekonomian kaj median pilierojn malprofite al la tria piliero, jam konsiderata kadre de la temo pri daŭripova elvolviĝo: tiu socia, ĉar ĉiuj devus esti analizataj samegale.

Tiusence, LBV apogas la kurantan starigon de la Celaro por la Daŭripova Elvolviĝado (ODS) — paralele al la streboj por plenumo de la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC). Ili celas enplektiĝi kiel nova kaj pli ampleksa platformo de evoluigo proponota de Unuiĝintaj Nacioj post 2015 (limtempo de la JEC). Tiaj devontigoj esence plu celus la redukton de la socia malegaleco, sed ĉiam ligita al la moderigo de kaj adaptiĝo al la klimataj ŝanĝiĝoj, same kiel al la prevento de veaĵoj.

Por la sukceso de la nova agendo, LBV sugestas ke oni faru krompaŝon, enkondukante en la tagordon de la debatoj la konceptojn pri “Solidara Elvolviĝado” kaj “Ekonomio de la Spirita kaj Homa Solidareco”, tezoj proponitaj de la brazila edukanto José de Paiva Netto. De jardekoj la du konceptoj fundamentas la socialasistan kaj edukan servadon de la Institucio. Laŭ tiuj konceptoj, la laboro de LBV kreskis eĉ meze de la ekonomia krizo.

La prognozo de la aŭtoro daŭre aktualas, kiel konfirmas ĉi tiu elprenaĵo de artikolo publikigita de li: “*Rilate Ekonomion, ciferoj indikas malfacilajn jarojn. Pro tio estas nepre necese rigardi, kiel mi elstarigis en ĵurnalo* Folha de S.Paulo*, en la jaro 1982, ĝin kiel plej spiritecan sciencon, en plej vasta senco de Ekumena Frateco. Ekonomio devas malkovri altruisman spiriton*”. En 1981, okaze de plia intervjuo pri la temo, li tiam jam diradis: “*La homo, kun sia Eterna Spirito, estas la centro de Altruisma Ekonomio, kiu produktas la tutan progreson. Sen li, ne ekzistas laboro, nek kapitalo. (...) En epoko kiam, pro la teknologia progreso, la rezultoj de produktado fariĝas superitaj, malsato efektive estas skandalo! Ne nur la korpa malsato, sed ankaŭ tiu de konoj, nome spiriteca Edukado, sen kiu neniu popolo estas forta. Anakronisme, neniam la mondo spertis unuflanke tiom da abundo kaj aliflanke tiom da mizero. Mankas Solidareco al Ekonomio*”.

**La centreco kiun LBV atribuas al la homo, kaj la integra maniero kiel ĝi komprenas lin, permesas ke**

*Edukado ludas fundamentan rolon por plifirmigo de nova tutmonda konscienco, kiu preparu la nunajn kaj venontajn generaciojn por profundaj kondutaj ŝanĝiĝoj.*

**ĝi identigu lin kiel ĉefan fokuson de ĉiaj klopodoj celantaj la ekvilibron inter la tri pilieroj de la daŭripova elvolviĝo. Tiusence, Edukado ludas fundamentan rolon por plifirmigo de nova tutmonda konscienco, kiu preparu la nunajn kaj venontajn generaciojn por profundaj kondutaj ŝanĝiĝoj. Tiucele, tia eduka propono devas esti fundamentita sur universalaj valoroj, kiuj pli kaj pli utilos kiel bazoj kaj induktiloj de novaj modeloj de evoluigo. (...)**

> *Aliro al publikaj servoj kun bona kvalito (...) estas esenca por la konservado de vivokvalito, eĉ fronte al ekonomiaj ŝanceliĝoj de la landoj.*

## Edukado por Planeda Civitaneco

Pluraj dokumentoj de Unuiĝintaj Nacioj rekonas la gravecon de la spirita dimensio en la homa vivo, tamen, tiun percepton nek ĉiam akompanas, en la sama proporcio, praktikaj decidoj. LBV optimisme vidas la urĝecon de iniciatoj kiel tiu de la Indico MEF (Malneta Enlanda Feliĉo) por evoluado, kiu aldonas novajn indikilojn al tiuj konvenciaj, prenante subjektivajn aspektojn de la homa ekzistado — ne malpli gravaj kaj determinantaj en la socia strukturo ol la ceteraj. Ekde sia origino, en la 1940aj jaroj, la Institucio aplikas universalajn principojn de Ekumena Spiritualeco en la ĉiutagajn agadojn.

Malriĉeco estas multdimensia fenomeno, en kiu la manko de minimuma enspezo estas nur la flanko pli evidenta. Aliro al publikaj servoj kun bona kvalito, kiel salubrigo, sano, energio kaj edukado, estas esenca por la konservado de vivokvalito, eĉ fronte al ekonomiaj ŝanceliĝoj de la landoj (...).

Tiel, la valoroj pri Ekumena Spiritualeco aplikataj al Edukado prezentiĝas ne kiel superflua elemento, sed kiel efika strategio de socimedia investo, ĉar ili antaŭenpuŝas la Solidaran Evoluigon de la kolektiveco kaj la individuan konsciiĝon pri la Planeda Civitaneco. LBV restas je la dispono de la organoj kaj de la landoj konsistigantaj la Sistemon de UN, por kunhavigi principojn de sia pedagogia sperto, kiel okazas en tiuj landoj kie ĝi havas memstarajn bazojn.

## Rekomendoj

Al tiu nepra ŝanĝiĝo de paradigmoj, la Institucio aldonas la sekvajn rekomendojn, sistemigitajn surbaze de raportoj de la 9a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 6a Foiro pri Novigoj. Ili estis konstruitaj kunhelpe de la partoprenantoj:

- Valorigi la pluvajn kaj marajn rimedojn per raciigo de fiŝado kaj plivastigo de akvokulturo. Tiu aktiveco estas strategie grava por la inkludanta daŭripova elvolviĝo. Ĝi estigas dungojn kaj produktas erojn kun alta nutra valoro, tiel kontribuante al forigo de malsato (manĝada kaj nutrada sekureco) kaj de malriĉeco, kun refleksoj sur la prevento de senarbarigo kaj sur la media difektiĝo.
- Investi en esplorojn pri la energia potencialo de algoj, kiuj povas fariĝi grava krudmaterialo por produktado de bioenergio.
- Plifortigi la administran sistemon de akvaj rimedoj de UN.
- Venigi voĉon al la tradiciaj popolamasoj, per ilia prioritato en la procezoj de regiona evoluigo, ekde la planado ĝis la aplikado; samtempe valorigi ilian vivhistorion kaj praestablitajn kulturaĵojn, cele akordigi la produkto-kreskon de mangaĵoj kun la konservado de daŭripovaj tradiciuzaj formoj.
- Forte interveni en la strukturon de produktado kaj energikonsumado kaj

redifini la striktan merkatumlogikon, kiel determinanton de niaj necesoj, per adopto de vojoj kun malpli granda kolizio kaj pli granda efiko.

- Stimuli la restadon de la laboristo en la kampo, ekzemple, favorigante la kamparan turismon per laboristigado de lokanoj kaj havigante al ili kapabligon por prilaboro de la tero, per adekvataj teknikoj, cele al plibonigo de la produktado.

- Krei retojn de socia protekto, speciale por gejunuloj, konsiderante la situacion de tiuj kiuj nek studas nek laboras. La estigo de instruista reto, la plivastigo de la sistemo por kredito kaj mikrokredito, plus la plifortigo de la sekundara lernejo kaj de la sociaj organizoj, estas kelkaj el tiuj paŝoj analizotaj kaj aplikotaj.

- Plifortigi la efikon de iniciatoj de la organizita civitanaro, per kapabligo de institucioj por plenumo de taksado pri socimedia kunpuŝiĝo kaj por fariĝi memstaraj, konsidere al la malkresko de iliaj financo-fontoj pro la krizo en la evoluantaj landoj.

- Antaŭenigi enspezigajn aktivecojn, surbaze de la reuzo de solidaj restaĵoj, kaj de aliaj mediagadoj.

- Valorigi la okupon de kolektisto de recikligitaj materialoj, reliefigante lian gravecon laŭ la ekonomia, socia kaj media aspektoj; apogi la estigon de kooperativoj de kolektistoj kaj ilian partoprenon en reto de selekta kolektado (deviga) kaj recikligado de solidaj restaĵoj; plifortigi la konsciiĝon de la popolo rilate adekvatan apartigon de la rubaĵo.

- Plifortigi la politikojn pri manĝada kaj nutrada sekureco, stimulante la familian terkulturon por produktado de ekologiaj nutraĵoj, por adopto de komunumaj legomĝardenoj kaj ankaŭ por formado de "bankoj de manĝaĵoj" kaj komunumaj kuirejoj, kiel la kurantaj eksperimentoj en Brazilo. Konsciigi la popolon pri la malŝparo kaj plena uzo de la manĝaĵoj.

- Garantii ian bazon de socimedia protekto por loĝantoj en areoj medie konservataj kaj setlejoj de daŭripova evoluigo (legu paĝon 91).

- Estigi politikojn por apogi komunumajn asociojn kaj neprofitcelajn organizojn, kiuj agadas kiel mediaciantoj en politikoj pri ensocietiĝo.

## Konkludo

LBV dankas ĉiujn personojn, kiuj kunlaboris por la sukceso de la 9a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 6a Foiro pri Novigoj, kaj pretas kunhavi kroman materialon. Por fini, ĝi vokas ĉiujn al la signifo de kolektiva respondeco kapabla garantii agadojn en la nuntempo celantajn plibonan estontecon por la Homaro, kiel en la mesaĝo de la ĉefgvidanto de LBV: ***"Mastri la propran hejmon, organizojn, entreprenojn kaj naciojn signifas alveni pli frue**. Alidire, per decido kaj efika teniĝo, strebi anticipiĝi al la okazaĵoj, evitante malfacilaĵojn aŭ eĉ ĝustigi la vojon antaŭ riskoj anoncantaj sin sendepende de tempo kaj loko".*

*"La homo, kun sia Eterna Spirito, estas la centro de Altruisma Ekonomio, kiu produktas la tutan progreson."*
**Paiva Netto**


André Fernandes

# INTERSEKTORA FORUMO

RETO SOLIDARA SOCIO

6-a Foiro pri Novigoj apoge al Ministeria Jara Revizio de Ekosok/UN

LBV

## *Apogantoj*

Plano Brasil sem Miséria

Ministério do Desenvolvimento Social e Combate à Fome

Governo Federal — Brasil — País rico é país sem pobreza

Ministerio de Trabajo, Empleo y Seguridad Social

Formación Continua

OEI — Organización de Estados Iberoamericanos — Para la Educación, la Ciencia y la Cultura

Montevideo deTodos

Secretaria de Estado de Mineração, Geodiversidade e Recursos Hídricos

Amazonas — Governo do Estado — Trabalhando para criar oportunidades

Secretaria de Desenvolvimento Social e Transferência de Renda

GDF — Juntos por um novo DF

ONG Moradia e Cidadania — Criada pelos empregados da CAIXA

Instituto Cooperforte — Passaporte Solidário

Fundação Dom Cabral — FDC — Desenvolvimento de Executivos e Empresas

OAB São Paulo

mides

CMTU Londrina — Companhia Municipal de Trânsito e Urbanização

ANONG Uruguay

Ativa editora e gráfica

APCEF/SP




Ni kredas, ke ekzistas solvo por la mondaj problemoj:

# Bona Volo

Eksciu kiel oni praktikas ĉi tiun proponon, en kelkaj landoj kaj per kiu maniero vi povas helpi.

LBV

Vizitu LBV-on de Novjorko kaj vidu kiamaniere tiun gravan idealon viviĝas en la Granda Pomo!

Elŝutu la QR-kodon en vian komputiltelefono, fotu la kodon kaj ŝatu la paĝon de portalo Bona Volo ĉe Facebook.

BRAZILO Centra Sidejo: Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • San-Paŭlo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.bonavolo.com

USONO 36 W 44th Street Mezzanine • Manhattan • Novjorko • 10036 • Tel. (+1646) 398-7128 • www.legionofgoodwill.org • www.facebook.com/legionofgoodwill